

Konkluda komento pri la eventoj en la Esperanto-movado en 2010

Kompleta Ba(r)lasto(no)

La usona sindromo prosperas

Mia finan raporto pri la jaro 2010 – kiel alternativo al la estrara raporto publikigita en la revuo *Esperanto* (UEA) – komenciĝu per jena amuza anekdoto: En sia malferma artikolo en la junia eldono de la revuo *Esperanto* (UEA), la aŭtoroj Corsetti/Dasgupta starigis atentindan kaj samtempe kuriozan hipotezon, nome: „Ke la ĉefa problemo de UEA en la pasintaj 60 jaroj estis la malforteco de la usona landa asocio. Ĉar se hodiaŭ reaktuala alvoko de Esperanto estus veninta el la usona kontraŭkulturo, ni estus nun en bona pozicio, kiel... la rokmuzika industrio.“

Ĉu temas pri ŝerco ? Se temas pri serioza aserto, oni ĝin povus konsideri kiel vere originalan, kvankam ĝi enhavas unu ĉefan pensaron: Jes sub la klarigitaj premisoj ni estus kun Esperanto eble en simila pozicio kiel la usona rokmuziko, *se Esperanto ne estus Esperanto, sed la angla*, kiel necesus honeste aldoni en la artikolo de Corsetti/Dasgupta.

En intervjuo kun „Aleksander Stump“, nova ministro pri eksterlandaj aferoj de la „Esperanta Respubliko“¹, estis efektive konfirmite, ke Usono estas la ĉefa malhelpo, por ke Esperanto venku en la mondo. La „ministro“ diris al la demando de la reportero: „La ĉefa obstaklo certe estas Usono. La usonaj politikistoj en la internaciaj kunvenoj jam rimarkis, ke la eŭropanoj ĉiam interparolas en Esperanto. Ilin tre tedas, ke ili ne komprenas, kaj ili nun suspektas, ke ni disvolvas konspiracion kontraŭ Usono. La situacio nun pli kaj pli ofte proksimiĝas al deklaro pri milito inter Usono kaj EU. La situacion ofte savis tio, ke la usonaj kaj eŭropaj politikistoj en vesperoj ofte amuziĝis per spekti glacihokean eventon, kie ludis Kanado kontraŭ Usono aŭ kontraŭ iu eŭropa lando. La kanada glacihokea teamo ja estas nia komuna malamiko, tio kunigas kaj amikigas nin.“²

B-komitatanoj kaj aliaj intrigoj

Ni revenu al la pli seriozaj temoj, kvankam ilia aktualeco jam iom pasis. Kiel oni povis antaŭvidi, novaj komitatanoj B fariĝis tiuj kandidatoj, kies nomoj estas plej popularaj en la Esperanto-movado, dum la ceteraj ne atingis sufiĉajn voĉojn por esti elektitaj. La 1-an de junio okazis en la Centra Oficejo de UEA la nombrado de la voĉoj donitaj en la elektado de ses komitatanoj B por la periodo 2010-13. Balotilo estis sendita al 4801 individuaj membroj, el kiuj voĉdonis 1550, t.e. 32,3%. Estis 1527 validaj kaj 23 malvalidaj balotiloj. Plej multe da voĉoj, 1010, ricevis *Mark Fettes*. La aliaj kvin sukcesaj kandidatoj estis *Probal Dasgupta* (973), *Barbara Pietrzak* (876),

¹ <http://esperantarespubliko.blogspot.com>

² <http://www.esperanto.fi/esperantolehti/Stump.htm>

Amri Wandel (820), *José Antonio Vergara* (816) kaj *Wu Guojiang* (732). Ne elektitaj estis Petr Chrdle (653), Jukka Pietiläinen (613), Marija Belošević (529), Tomasz Chmielik (491), Paulo Branco (443), Josip Pleadin (309) kaj Johan Derks (282).³

Interesa estas jena cirkonstanco: En la jaro 2009 Universala Esperanto-Asocio havis 5713 individuajn membrojn (IM). En la aktualaj elektoj balotilo estis sendita al 4801 individuaj membroj, el kiuj voĉdonis 1550. Do dekomence ekskluditaj el la baloto estis 912 membroj, ĉar ili ne pagis la kotizon. Resume: 4163 individuaj membroj NE partoprenis la baloton. Ne necesas detale komenti tiujn rezultojn kaj farojn. Oni povas nur bedaŭri, ke sep tamen signifaj kandidatoj ne estis elektitaj en la komitaton, kie ili povus esti utilaj, kaj volus aldoni jenan observon: La konduto de la voĉdonintoj estas mirinda. Krom la ĉino ĉiuj aliaj elektitaj B-komitatoj estis samtempe kandidatigitaj por la estraro (Fettes retiris sian kandidatigon kaj Vergara estis faligita), dum neniuj el la neelektitaj kandidatoj eksplicite havis la ambicion fariĝi estrarano. Alivorte: La elektitaj B-kandidatoj forkaptis la mandatojn por la B-komitataneco, da kiuj ekzistas nuntempe ses, dum la aliaj ses kandidatoj, kiuj sincere disponigis sin por tiu ofico (legu la intervjuojn kun ili en *Libera Folio*), ne povis fariĝi komitatano, pro la ekzisto de stulta regulo kaj absurda formala burokratio. Eblas do paroli pri farso. Necesas ŝanĝi tiun regularon! Kiun sencon tiu okazinta proceduro pri elekto de B-komitatoj havas? Ŝajnas ke ĝi servas al iuj spekulaciaj ludoj por iuj eternaj funkciuloj, kiuj nepre volas esti reelektitaj, dum ĝi nur seniluziigas kuraĝajn kaj entuziasmajn samideanojn, kiuj ricevas vangofrapon, ĉar ili ne estas sufiĉe konataj aŭ ne ricevas la necesan apogon pro alia kialo. Eĉ unu komento flanke de la komitato aŭ de UEA ne estis farita pri la rezulto de tiuj elektoj. Ĉar nia movado dependas de ĉiuj kapablaj kaj honoroficaj fortoj, en tiu kazo la superflua konkurenco por postenoj estu forigita, kaj prefere ĉiuj sin disponigintaj kandidatoj estu akceptitaj kiel novaj komitatanoj. Damaĝon al la movado tio certe ne faras.

Reprezente por multaj, iu pola samideano komentis la elektojn de la B-komitatoj jene: „Pardonu karaj, sed kiel simpla esperantisto mi tute ne komprenas la elektan teatraĵon. Mi kontribuis por vigligi la diskutadon, ĉar mi opinis, kiel multaj aliaj, ke renovigado estas nepre bezonata. Mi ĝojis, ke venis novaj ideoj de pli junaj homoj, kvankam ankaŭ ne tro revoluciaj, tamen kuraĝaj por iom ŝanĝi la elektitan sakvojon. Mi ĝojis kaj esperis. Nun mi tute ne komprenas por kio estas tiu farso farata, por kio utilas voĉdoni, se jam estas klare? Por kia diablo bezonataj estas ABC kaj eble Z-klasoj? Ĉu ne simple kaj klare estus voĉdoni kaj unuaj plej bonaj elektas demokratie prezidanton? Kial tiel kompliki, se povus esti pli simple? (...) Mi aliĝis ĉi-jare al UEA kaj se mi vere ne vidos emon ŝanĝi arkaikan kapuson, estis ankaŭ mia lasta jaro de la aneco kaj provo konvinki aliajn.“ La sama kritikanto opinias ankaŭ, ke en la nuntempo oni povas gvidi konferencojn pere de Skajpo, por kio neniuj elspezoj estas bezonataj. Kaj li komencas dubi pri tiuj funkciuloj: „Ĉu vi vere volas helpi al la Esperanto-ideo, aŭ ĉu nur temas pri oportunaj postenoj? Klasbatalo? Hegemonio?“⁴

³ Ĉio pri tio vd. <http://www.liberafolio.org/2010/mark-fettes-sur-unua-loko-en-la-elektoj-de-uea>

⁴ <http://www.liberafolio.org/2010/la-sekva-prezidanto-de-uea-estos-probal-dasgupta#1274617253>

Nova malnova estraro

Lige kun la antaŭa oni ankaŭ ne miras pri la plumpa konfirmo de la ‚nova‘ estraro en Havano, kiu tamen estis modifita je tri novaj figuroj. Mi rekomendis ne reelekti tiun estraron, sed kompreneble la voĉoj esprimitaj de iuj eksteraj konsilantoj ne estas aŭdataj, plej lasta de la komitato de UEA. Nu, finfine tiu estraro ne estas mia problemo, kaj altrudi mian volon aŭ konsilon mi ne celas aŭ deziras. Mi konscias, ke estas malfacile kompili novan estraron kaj ke oni devas preni tion kio sin proponas. Kun Dasgupta tamen okazis malgranda perturbo. Dum la baloto pri la B-komitatoj *Libera Folio* ricevis respondon de Probal Dasgupta al demando pri tio, ĉu efektive la voĉdonado de la individuaj membroj ne povos influi la konsiston de la estraro: Dasgupta respondis jene: „Jes, mi restas ĉe mia sindevontigo farita kaj raportita: mia kandidateco kiel prezidanto dependas de elekto kiel komitato B. Se mi ne elekto kiel komitato B, mia kandidateco forfalos, kaj la elekta komisiono estos devigata rapide refari siajn tabelojn.“ La fakto, ke li tamen kandidatas kiel C-komitato, laŭ li devas esti sekvo de ia miskompreno, ĉar li mem nenion faris tiudirekte, li diras: „Se okazis miskompreno, ĝi nepre fontis el jeno. Foje okazas, ke iu sendas al mi retmesaĝon kaj diras, ‚Se vi ne respondos en la venontaj x tagoj (ekz 10 tagoj), ni supozos, ke vi respondas jese.‘ Pro vojaĝado (ĉefe enlanda) kaj aliaj kialoj (ekzemple troa entuziasmo fare de la spamfiltrilo), iujn mesaĝojn mi tute ne vidas, kaj la sendinto do supozas, ke mi respondis jese. Io tia - laŭ mia supozo - eble okazis en tiu ĉi kazo, krom se la elekta komisiono rajtas krei siajn listojn surbaze de propra iniciato kaj sen demando pri tio la kandidaton.“⁵ Mi ne komentu tiun pravigon.

„Unuel“ aldonis en *Libera Folio* pri tiu teatro: „Estas rimarkinde, ke la prezidanto de UEA ne scias, por kiuj postenoj li kandidatas, kaj kiel okazis lia kandidatiĝo.“ Li konsideras la prezidanton konfuzita.⁶

Ne nur pro la fifama kaŭdervelŝo, kiun la prezidanto de UEA kutime postlasas en siaj meditaĵoj, pri la taŭgeco de Dasgupta kiel prezidanto aperis duboj de diversaj flankoj, ankaŭ el Hindio (Barato) mem, kaj la kritiko rezonis sufiĉe draste: Sub la titolo „Baratanoj perdas tempon, iu „Vijaykumar“ afiŝis la 27an de majo 2010 jenan mesaĝon en *Libera Folio*: „Mi estis feliĉa en 2007 ĉar nia landano fariĝis prezidanto de UEA. Mi divenis ke la prezidanto de UEA kuraĝigos nin progresigi la landan movadon. Bedaŭrinde, mi aŭdis de nia landa prezidanto D-ro Abdul Salam, ke la prezidanto de UEA dum la pasintaj 3 jaroj neniam kontaktis d-ron Salam kaj telefone kaj persone, enketi kian helpon UEA povas doni al FEB fortigi la movadon. Renato (Corsetti) ĉiam memorigas nin havi fortan movadon. Sed en nia lando monda kaj landa prezidantoj ne komunikigas. Ĉu UEA povas ŝanĝi tiun situacion? Mi pensas ke Probal havas devon varti la landan movadon ankaŭ. Alie, li perdas moralan kvalifikon esti prezidanto de UEA. Samtempe FEB ankaŭ perdas oran ŝancon!“⁷ Nu, la respondo al tia demando povas esti nur unu tre simpla: Prezidanto, kiu nenion faris en la pasintaj tri jaroj, ankaŭ nenion faros en la venontaj tri jaroj.

⁵ La tutan ĉi-koncernana korespondadon vd. <http://www.liberafolio.org/2010/la-sekva-prezidanto-de-uea-estos-probal-dasgupta#1274964628>

⁶ <http://www.liberafolio.org/2010/la-sekva-prezidanto-de-uea-estos-probal-dasgupta#1274645464>

⁷ <http://www.liberafolio.org/2010/la-sekva-prezidanto-de-uea-estos-probal-dasgupta#1274964628>

Kiel ajn, la plej aktuala publikaĵo de Dasgupta estas iu artikolo kun la titolo ‚The global language‘, aperinta en ‚The Times of India‘ la 14an de julio 2010. Laŭ la gratula lavango, kiu sekvis flanke de la UEA-komitato, oni devus kredi, ke ĉe tiu artikolo temas pri eksterordinara majstroverko. Nu, legu ĝin mem.⁸

Elekta Komisiono en erekta stato

La altrudan konduton de la Elekta Komisiono kaj la kapitulaca reagado flanke de la komitato mi ne povas aprobi. La Elekta Komisiono de UEA, konsistanta el d-ro Renato Corsetti, Lucille (Lusi) Harmon kaj Ileana Schroeder, ŝajnis, ke oni vaste korespondadis kun ĉiuj prezentitaj kandidatoj: „La komisiono post interparolado tre vasta kun ĉiuj koncernatoj taksas, ke ĝia tasko estas certigi teaman kunlaboron en la estraro (kaj ankaŭ en la aliaj teamaj taskoj de la reviziantoj kaj de la financa komisiono). Pro tio kaj kun granda bedaŭro la elekto-propono por la estraro ne akceptas kelkajn el la sugestitaj komitatanoj.“⁹ Komprenoble la veraj kialoj aŭ konsideroj ne estas reflektataj. Ekzemple pri kandidato Vergara oni povis aŭdi, ke li trovis kiel tria ekstereŭropa estrarano, ĉar la financoj de UEA tion ne eltenus kaj ke la vojaĝoj de estrarano el Israelo (ekzemple al Roterdamo) kostus iom malpli. Vergara mem ŝajne havas alian supozon pri la vera kialo de sia elimino: Iuj simple ne plu volis lin reelekti, eble ĉar ili rimarkis, ke li ne tro ŝatis tiun estraron. Plurfoje li esprimis sian opinion en *Libera Folio*, kie lia fervoro pri Esperanto kaj UEA estas dokumentita – sed nek lia fervoro, nek lia flatado kaj afableco, nek lia optimismo helpis al li por esti rekandidatigita. Do, li izoligis. Kun Wandel kaj Gutiérrez aperis fortaj ambiciaj kandidatoj, ĝuantaj grandan subtenon de Corsetti, kontraŭ kiuj iu Vergara ŝajne havis nur malgrandan ŝancon. Kiel montris la Estrara Raporto, Vergara ankaŭ ne multon povis fari kiel estrarano pri faka kaj scienca agado,¹⁰ kaj krom raportoj pri la agadoj de tiuj eksteraj fakaj organizoj kaj konstati, ke Vikipedio kaj IKU bonfartas, kio estas iom tro arbitra aserto, samtempe li ne hezitis lamenti pri la „malmultnombreco de niaj vicoj“ kaj pri la „maltrankviligaj signoj de stagnado ĉe pluraj fakaj asocioj“. Tia pesimisma kritiko, ne dankon ! Do, Vergara restos al ni konservita almenaŭ kiel komitatano B, kie tiu simpatia sudamerikano ricevos duan ŝancon prui sian kapablon kaj batoforton. La posedo de komitatano el Ĉilio estas granda ŝanco por UEA kaj la tuta Esperanto-movado, kiu volas esti internacia.

Pri la „reelektoj“ de la estraro en Kubo, kiuj efektiviĝis tute laŭ nia antaŭvido, raportis kiel unua *Libera Folio* la 18an de julio 2010.¹¹ Al tiuj komunikoj oni devas aldoni nenian komenton, ĉar ne indas raportoj pri tiuj ‚reelektoj‘, fakte konfirmoj. kiuj estis zorge planitaj de la ŝajne omnipotenta Elekta Komisiono, (kiu estas prezidata de radikala maldekstrulo el Italio). Laŭ raportoj en *Libera Folio* dum la komitata diskuto

⁸ <http://timesofindia.indiatimes.com/Home/Opinion/Edit-Page/The-global-language/articleshow/6163671.cms>

⁹ <http://www.liberafolio.org/2010/raporto-de-la-elekta-komisiono-de-uea>

¹⁰ Tamen dum lia mandattempo aperis du volumoj kadre de la serio Scienca Penso, kiu estis ŝajne proponita de Vergara, vd. <http://www.ipernity.com/blog/36848/187294/comment/7290771>

¹¹ <http://www.liberafolio.org/2010/probal-dasgupta-reelektita-en-kubo#1279448674>, vd. ankaŭ

<http://www.uea.org/dokumentoj/komunikoj/gk.php?no=389> kaj

<http://www.esperantio.net/index.php?id=1371>

Halina Komar el Pollando kritikis la elektoproceson, kiu rememorigis ŝin pri la elektoj en Pollando dum la socialisma epoko. Interese estas, ke kiel neniu alia Halina Komar lastatempe tre kritike esprimiĝis pri la evoluo en UEA, kaj ŝi anoncis ankaŭ sian retiriĝon.¹² Verŝajne ŝi komencis kompreni la sencecon kaj senperspektivecon de la afero...¹³ Ŝoke estas konstati ankaŭ, ke la Alta Protektanto de la kongreso estis internacie fikonata membro de la subprema aparataĉo de Kubo. Krom tio ŝajnas, ke la ŝtataj instancoj de Kubo montris ĉi-foje multe malpli da atento al la kongreso ol antaŭ dudek jaroj, kiam Fidel Castro persone aperis inter la esperantistoj kaj deklaris sin „soldato de Esperanto“.¹⁴ Tiu ekonomie putra, politike mismorala kaj turisme multe tro kosta komunista Kubo, kiu kapablas sin teni nur per turismo kaj ekstera financa kaj evolua helpo, dum samtempe ĝi daŭrigas sian agreseman retorikon kontraŭ tiuj helpantoj, dum interne ĝi subpremas ĉiun liberecon kaj ĉian kritikon, do maldigne eniros la gloran historion de la Universalaj Kongresoj de UEA, kiu ne komprenis, ke kongresi en Kubo sub la nuntempaj cirkonstancoj estis eraro, eĉ en la kazo de politike neŭtrala organizaĵo, kiu laŭ sia statuto alte taksas la Homajn Rajtojn.¹⁵ La kongreslanda koŝmaro ankoraŭ ne finiĝis: post Kubo sekvos Vjetnamio¹⁶ kaj diablo scias kiuj kanajlaj ŝtatoj ankoraŭ en estonteco.

Kuba estraranino

Ankoraŭ kelkaj frazoj pri la alelektita estraranino el Kubo. Anstataŭ la ĉiliano José Antonio Vergara, kiu ŝajne estas sufiĉe ĉagrenita pro tiu aĉa intrigo, UEA do preferis reinstali la kubaninon Maritza Gutiérrez, kiu jam dum 2004-7 estis estrarano de UEA pri landa kaj regiona agado, fakte sen postlasi videblajn spurojn aŭ atingojn. Vergara do estis duoble anstataŭita (kaj trompita): Kiel latinamerikano de la kubanino kaj kiel estrarano pri faka agado de la israelano.

Pri la nova estraranino Maritza Gutiérrez González estis en *Libera Folio* jam faritaj kelkaj demandoj flanke de Andreas Künzli:

1. Kubaj civitanoj daŭre povas nur tre malfacile forlasi Kubon kaj havas grandan problemon vojaĝi eksterlanden, kaj politike kaj ekonomie. Kiel estrarano pri Landa Agado oni devus havi liberan eblon viziti ne nur Venezuelon kaj Nikaragvon, sed praktike ĉiujn landojn de la mondo, inkluzive de Usono. Ĉu M. Gutiérrez povas libere vojaĝi kiam ajn al kiu ajn lando de ŝia deziro ?

¹² <http://groups.yahoo.com/group/komitato-de-uea/message/5798>. Alikaze Halina Komar subskribis peticion kontraŭ la unuanima decido de la estraro de UEA koncerne la nuligon de la kontrakto kun Stano Marček, vd. <http://www.esperantio.net/index.php?id=1399>

¹³ Vd. <http://groups.yahoo.com/group/komitato-de-uea/message/5830>

¹⁴ Ĝuste en la tempo de la havana UK Fidel Castro revekiĝis el la regno de la duonmortintoj por kaŭzi internacian miradon per iuj iom sensaciaj, sed ŝajne ne seriozaj eldiroj pri Irano, nuklea milito, fiasko de la kuba modelo, k.s.

¹⁵ Kion en la kongresa kuriero oni devis legi, estis parte harhirtiga. Tie ekzemple iuj komunistoj skribis pri „teroro kontraŭ Kubo“ kaj simile.

¹⁶ Mi ŝatus nur atentigi, ke laŭ la Nigra Libro de la Komunismo, la nombro de murditoj, pri kiuj laŭdire respondecas Ho Chi Minh, estas taksata je ĉirkaŭ unu miliono. Do mi petas tiujn esperantistojn, kiuj pilgrimos al la maŭzoleo de Ho Chi Minh en Hanojo, konsideri tiun cirkonstancon.

2. Kian rilaton M. Gutiérrez havas al la kubaj politikaj instancoj kaj (sekretaj) servoj ? Ĉu ekzemple ŝi devas raporti pri vojaĝoj kaj kontaktoj al ŝtataj instancoj, menciis nomojn de personoj, kun kiuj ŝi havis kontakton ktp. ?

3. Kiu pagos (aŭ devos pagi), ekster Kubo, ŝiajn eksterlandajn vojaĝojn kaj ŝiajn restadojn en la cellandoj ?

4. Kiel M. Gutiérrez intencas plenumi sian korespondadon, kiu ja sendube aŭtomate aperos kaj necesos se oni estas estrarano pri landa agado ? Propraj spertoj montriĝis, ke retkorespondado kun kubanoj en Kubo estas ege malfacila ĝis nebla afero. Praktike respondo oni ne ricevas. Ankaŭ telefonalkvokoj (ĉefe mobila reto) ne funkcias kaj denove neniu respondas. Supozeble M. Gutiérrez havas aliron al la reto kaj al la telefono kaj respondas retmesaĝojn kaj telefonalkvokojn, ankaŭ el eksterlando, sed kiel ŝi rilatas kun la ekstera mondo, se la konektoj en Kubo ŝajne daŭre estas malhelpataj ?¹⁷

Kompreneble, ĉi tiuj demandoj ne estis responditaj. La havananino preferas per banala komento sed akurate interveni en la komitata retlisto, kie aperas la taŭga momento kaj kie estas bonvene flataĉi kadre de la amikaro, al kiu oni ŝatus aparteni.¹⁸

La plej magraj kontribuoj en la Estrara Raporto devenis ĝuste de s-ino Gutiérrez, kiam ŝi respondecis pri Landa kaj Regiona Agado, precipe en la jaroj 2006 kaj 2007. Do, oni ne scias, kion ŝi faris en tiu periodo kiel estrarano pri landa kaj regiona agado. Ŝajnas, ke UEA „elektas“ estraranojn ne laŭ la kriterioj de kompetenteco kaj fruktodoneco, sed laŭ iuj aliaj kriterioj, kiuj ne estas klaraj al la publiko kaj ŝajne restas sekretaj. Sed rigardante kio okazas oni povas pli malpli diveni tiujn kriteriojn, inkluzive politikaj.

Estrara Raporto 2009-10

La Estrara Raporto publikigita en la junia numero de la revuo *Esperanto* (UEA) entenas sendube multajn interesajn kaj valorajn informojn pri la poresperanta agado en la diversaj landoj, fakoj kaj kampoj de la pasinta jaro. Kiel kutime la raporto estas verkita en iom fanfarona-propagandeca tono, dum la kritika reflektado kaj memkritiko grandparte forestas. En tiu raporto estas malfacile distingi la ĝeneralan agadon disde la konkretaj aktivecoj kaj atingoj de la unuopaj estraranoj, kiuj evidente estas tre magraj. Tre interese estas observi kiuj agadoj kaj personoj estas menciitaj kaj kiuj aktivecoj kaj personoj estas prisilentitaj (nu oni ja ne povas menciis ĉion). Ekzemploj abundas. Cetere la parto de Dasgupta mem en la Estrara Raporto simple mankas. Nia prezidanto eble reiru al Barlastono por instrui Esperanton, por havi ion priraportindan. Lia sola kontribuo en tiu Estrara Raporto estis la atentigo, ke ĉe la Estrara Raporto temas pri raporto, kiu „kovras la antaŭan kalendaran jaron kaj ĝi traktas tiujn agadojn, kiuj estas

¹⁷ Iu esperantisto, kiu vizitis ĉi-jare Kubon kaj kiu spertis la kontaktproblemojn de kubanoj, skribis al mi: „En Kubo, ne ĉiuj havas telefonon. Eble nur duono uzas iun retadreson, ankoraŭ malpli havas memkomputilon (uzas privatan aŭ laborejan de amikoj). Foje mesaĝoj ne alvenas, aparte tiuj kun ligitaj dosieroj aŭ tro grandaj. La interreto ekster Kubo iras tra kostaj satelitoj, Usono blokas la konstruon de mara kablo, nun oni konstruas kablaron al Venezuelo. Eĉ se iu havas interreton, tiu ne rajtas uzi certajn servilojn, kiel Gmail...“ Sed ĉu ĉio tio validas ankaŭ por la estraranino M. Gutiérrez ?

¹⁸ Vd. ekzemple: <http://groups.yahoo.com/group/komitato-de-uea/message/5693>.

rekte ligeblaj al la Asocio.“ Li ankaŭ atentigis, ke „tamen, en la praktiko, estas foje malfacile distingi la agadon de la fakaj asocioj, aŭ eĉ de sendependaj institucioj, kiuj tamen proksime rilatas kun la Asocio“ kaj li finas per la frazo, ke „tiu ĉi raporto do prezentas la bildon de la agado de UEA en la kunteksto de la ĝenerala laboro de la Esperanto-movado, ĉefe dum la jaro 2009“. Bone, en ordo, sed la riproĉo pro minimalismo Dasgupta ne povas eviti.

La financoj (spezoj) de UEA

Se ni analizas la financojn (spezojn) de UEA, kiuj estas publikigitaj sur la retpaĝoj de uea.org ekde la 22an de junio 2010, mi konstatas perplekse jenon:

La ĉefajn kostojn en UEA kaŭzas la oficistaro de la Centra Oficejo, nome 306'000 eŭroj (buĝeto 2010: 320'000 kaj 2011: 332'000) inkluzive de salajroj, sociaj asekuroj, vetursuplemento, pensiaranĝo. Mi ne komentas tiun ciferon, sed kiel membro de la asocio starigas la simplan demandon: Ĉu asocio kiel UEA povas al si permesi tiajn personarajn kostojn ?

Kompare kun tiuj personaraj kostoj la restaj unuopaj kostoj estas kvazaŭ neglektindaj: Centra Oficejo: 24-25'000 eŭroj, Oficeja domo 15-18'000 eŭroj, Revuo *Esperanto* 51'-60'000 (ĉu tro alta kosto por tia speco de revuo ? – el tio la dissendo kostas averaĝe 30'000 eŭrojn, intertempe eblas ricevi ĝin perrete), Jarlibro 15-16'000 eŭroj, *Kontakto* 10-13'000 eŭroj, Vojaĝ- kaj korespondkostoj 16'000 eŭroj, Movada Evoluigo (edukado, informado, eksteraj rilatoj) 9800 eŭroj, aliaj Ĝeneralaj Kostoj 6000 eŭroj, Amortizoj 5400-6300 eŭroj, Afrika oficejo 2000 eŭroj (2009), 5000 eŭroj (2010), 2000 (2011). Sumo de la kostoj: 461'500 (2009), 503'000 (2010), 506'000 (2011). Konklude: La kostoj kreskas kaj kreskas. Ŝparpotencialo ekzistas laŭ mia pritakso ĉe ĉiuj pozicioj, ekzemple pli malpli 10% por la venontaj jaroj, eĉ se la elspezoj kaj enspezoj estas ekvilibrataj. Tio signifus jaran ŝparon de 50'000 eŭroj ĉe la elspezoj. Ĉu realisme ? Oni devos eviti, ke la kostoj ĉefe por la administrado eksplodos. La salajrokostoj dependas de la demandoj kaj decidoj pri la nombro de dungitoj. Ĉe la rimedoj (enspezoj) estas sendiskute, ke necesus altigi la membronombron (aŭ altigi la membrotizojn), ĉar oni tute evidente vidas, ke nur la kotizoj kaj abonoj (245'000 eŭroj) ne kovras la kostojn por la oficistaro kaj vojaĝkostoj kaj por la produktado de *Esperanto*, *Kontakto*, Jarlibro. Ankaŭ la profito el la vendo de libroj (30-35'000 eŭroj) estas tro magra. Interese estas, ke ĉe la pozicio Servoj/kompensoj oni intencas altigi la enspezon de 21'500 eŭroj (2009) al 70'000 eŭroj (en 2010 kaj 2010). La kotizprocentaĵo ĉe Kongresoj kaj Turismo en 2009 estis 74'000, en 2010 ĝi estos 70'000 kaj en 2011 76'000 eŭroj. Kio signifas, ke la sumo de la rimedoj (enspezoj) estos 461'500 (2009) kaj pli ol 500'000 en la venontaj jaroj.

Ĉu oni povus peti monon de Unesko, de eksteraj sponsoroj, aliaj kanaloj ? Ĉu oni povus ion fari por enspezi pli da mono el turismaj servoj kaj agadoj ?

Nova Strategia Laborplano de UEA

Kaj nun mi ĉefe dediĉu mian atenton al la nova Strategia Laborplano de UEA, kiu devintus esti akceptita de la UEA-komitato en Havano.¹⁹ Sed la Strategian Laborplanon, proponitan de Probal Dasgupta, la Komitato evidente eĉ ne volis trakti,²⁰ kaj la publika intereso pri ĝi ŝajnis esti ekstreme malforta.²¹

Unue: La tempolimo 2011-2020 estas tro longa periodo. En la tre rapide ŝanĝiĝanta nuntempo oni ne plu faras tiajn longtempajn strategiajn planojn, kiuj povas esti eksaj jam post kelkaj jaroj kaj devas esti amenditaj (kiel tio okazis kun la antaŭa Strategia Laborplano 2001-2010, kiu estis amendita en 2007).

La ĉefa celo kaj plano de UEA por la venonta jardeko ne devus esti unuavice „Konsciigo pri lingvoj kaj lingvaj komunumoj“, sed la koncentriĝo pri la informado

¹⁹ Kiu laŭ iu komitatista mesaĝo de Osmo Buller estis principe aprobata de la komitato en Havano kaj kiu estu, post prilaboro, submetota al la komitato en Kopenhago. Ĝis la mezo de septembro la protokolo de la kubaj komitatkunsidoj daŭre ne aperis, kio instigis Claude Nourmont-Moon plendi, kaj prave (<http://groups.yahoo.com/group/komitato-de-uea/message/6005>).

²⁰ Laŭ <http://www.liberafolio.org/2010/probal-dasgupta-reelektita-en-kubo> „mankis diskuto pri strategia laborplano dum la kunsido. Kiam la komitato devis komenci la diskuton regis plena silento.“ Krome eblas tie legi: „La ne reelektita estrarano José Antonio Vergara tiam diris, ke preskaŭ necesus devige diskutigi komitatanojn pri tiom grava afero kiel strategia laborplano. Poste sekvis iom da diskuto, sed plejparte nur inter estraranoj.“ Dum kaj post la kongreso neniu kontaktito bonvolis respondi nian demandon kio fakte okazis/os kun tiu Strategia Laborplano.

²¹ La magra intereso pri tiuj dokumentoj estas okulfrapa: En la unuaj du semajnoj post ilia publikigo sur reto.uea.org ne pli ol inter 3-10 uzantoj elŝutis la Strategian Laborplanon, la spezkalkulon, la Tagordon de la komitataj kunsidoj, k.c. Ĝis la komenco de aŭgusto la dokumento „Spezoj de UEA-fondaĵoj“ estis elŝutita nur 14-foje, la propono pri tagordoj de la komitatkunsidoj en Havano nur 8-foje, la Plenumo de la Komitataj Rekomendoj UK-2009 nur 9-foje, la Propono pri ŝanĝoj en la interkonsento ILEI-UEA nur 9-foje, la Strategia Plano 2011-2020 (projekto de UEA-preziodnto) kaj la Spezoj de UEA en 2009 nur po 16-foje, la Bilanco de UEA je 31-12-2009 nur 9-foje, la Tagordo de la komitataj kunsidoj en Havano 2010 nur 11-foje, kaj la Estrara Raporto 2009 tamen 48-foje. Ĉi tiuj dokumentoj estis publikigitaj sur <http://reto.uea.org> ekde la 19a de junio 2010. La Protokolo de la komitata kunsido, Bjalistoko 2009, kiu estis publikigita samloke komence de septembro 2009, estis elŝutita entute 63-foje ĝis nun. La revuo *Esperanto* estas rete elŝutata kutime maksimume 338-foje kiel en la kazo de la numero januaro 2010 (la julia-aŭgusta numero estis elŝutita ĝis la 4a de aŭgusto nur 375-foje). En la sama periodo la revuo *Kontakto* estis elŝutita nur ĝis 150-foje. La samloke elŝuteblaj libroj „Kio ni estas kaj kion ni celas“ estis elŝutita nur 17-foje kaj la libro „Koncizas historio de la Esperanto-movado en Afriko“ nur 38-foje. El tiu pasiva sinteno konkludeblas malgranda intereso flanke de la esperantista publiko (t.e. UEA-membraro) kaj parte verŝajne ankaŭ ne sufiĉe serioza okupiĝo pri gravaj dokumentoj kaj demandoj flanke de la centraj gvidorganoj de UEA. Ĉi tiu pasiveco kongruas kun la kutima nerespondemo al enketoj flanke de la delegitaro de UEA kaj la ĝenerala malintereso partopreni en publikaj diskutoj kadre de retlistoj kaj retforumoj. La 31-an de julio estis registritaj 5151 individuaj membroj. Fine de julio pasintjare la nombro estis 5441. La malkresko do estas 290. El tio dedukteblas, ke verŝajne ne pli ol 10-20 procentoj de la Esperanto-movadanoj, kies nomoj aperas en diversaj asociaj adreslistoj, estas aktivaj. Inter elspezoj (de la laboro kaj produktado) kaj publika (membra) uzado do aperis grandega abismo, kiun la gvidorganoj de UEA devus serioze konsideri kaj diskuti, same kiel la demandojn, kiel aktivigi la membraron, kiel pli efike atentigi ilin pri la disponeblaj materialoj kaj kiel oni trovu kaj uzu ilin. Se montriĝas, ke la interreto ne estas ĉie same efike utiligebla, kiel ekzemple en Kubo, necesas aktive kaj efike posthelpi. Se la homoj ne legas aŭ aĉetas la aferojn, tro ofte oni havas la impreson, ke oni vane laboras por tiu Esperanto-movado.

kaj disvastigo de Esperanto, la altigo de la kvanta kaj kvalita niveloj de la esperantistaro kaj la produktado de kulturaj valoroj en Esperanto (la grava nocio „kulturaj valoroj” aŭ klarigo pri ĝi mankas en la Strategia Laborplano kaj la konsisto de „la valoro de la neŭtrala lingvo Esperanto“ ne estas priskribita aŭ difinita). Despli ke UEA ne disponas teoriajn kaj praktikajn rimedojn nek kapacitojn nek planon por „konsciigo pri lingvoj kaj lingvaj komunumoj“. Legante la titolon de la nova Strategia Laborplano oni ricevas la impreson, ke do la „Konsciigo pri lingvoj kaj lingvaj komunumoj“ ricevis prioritaton kaj ne la informado kaj disvastigo de Esperanto.

Entute la kerna celo de UEA ne estas kaj ne devas esti „konservi lingvojn kaj lingvajn komunumojn“, ĉar ĉi tion faras tiuj lingvaj komunumoj mem, eble kun la helpo de specialaj eksteraj organizaĵoj. La Esperanto-movado, kaj precipe UEA kiel organizo nek posedas tiun kernan fakan kompetentecon konsciigi pri lingvoj kaj lingvaj komunumoj, nek la rimedaron por konservi lingvojn kaj lingvajn komunumojn. Ni eĉ dubas, ĉu ĝi havas la sinceran intereson pri tiu intenco. En la historio de la Esperanto-movado ekzistas neniu ekzemplo, kie UEA „helpis plifortigi“, kun konkreta rezulto, lingvojn kaj lingvajn komunumojn, eĉ ne minoritatajn, sed male ŝajnas, ke ekzistis iuj etnaj minoritatoj, kiuj interesiĝis pri Esperanto sen ricevi la adekvatan respondon de la Esperanto-movado (ĉi tiu malbone konata temo devus esti esplorata, eble kun la helpo de IKEL).²² Se Esperanto helpis *ponti* inter *anoj* de diversaj lingvoj kaj etnaj kulturoj, tio estas alia afero, tiam ĝi servis al sia integra nobla tasko, kiu aŭtomate aperis pro la teoria sinkompreno kaj la praktikaj funkciaj trajtoj de Esperanto; sed tio tute ne signifas, ke Esperanto „helpis plifortigi“ tiujn lingvojn. Do, temas pri tre diversaj aferoj. Frazoj kiel „esperantistoj delonge kontribuadis al la diskonigado de la lingvoj kaj lingvaj komunumoj“ estas fakte nura propagandaĵo (kiu ekestis surbaze de poste interpretitaj pensoj de Zamenhof), same la imago, ke la Esperanto-movado, aŭ UEA, servu kiel „protektilo por la lingva diverseco kaj por ĉies lingvaj homaj rajtoj“ aŭ „pruvu la pac-potencialon de Esperanto en regionoj kun etna/nacia streĉiteco“ – ĉiaj tiaj imagoj devas esti taksataj kiel komplete paranoja supertakso de la propraj kapabloj en certaj Esperanto-medioj, unuavice de UEA mem, kiuj disvastigas tiajn pretendojn. La vero estas, ke la Esperanto-movado defendis ĉiam nur „nian aferon“, sed neniam aliajn lingvojn kaj popolojn – kiam tiuj suferis, UEA eĉ fere silentadis.²³ La sola pozitiva punkto en la Strategia Laborplano de Dasgupta estas, ke li elĵetis la „Indiĝenajn Popolojn“, ĉar tiuj vere estas superflujaj en la Strategia Laborplano de UEA.

²² Al mia demando „Ĉu vi disponas la scion, ke en la pasinteco ekzistis iuj etnaj nacimalplimulto, kiuj estis interesataj pri Esperanto kaj pri ties pera/helpa funkcio favore al la subteno kaj diskonigo de tiuj koncernaj nacimalplimulto ?“, Daniele Vitali, prezidanto de IKEL, respondis (25-06-2010), ke „mia opinio, almenaŭ inter la esperantistoj, la plej etnokonsciaj estas katalunoj, eŭskoj kaj flandroj. Se ni projekcias inversen, ni povus konsideri, ke inter tiuj etnoj la homoj esperantistiĝas pro naciaj kaŭzoj. Tamen mi ne scias pri popoloj, kiuj en socie konsiderinda amaso esperantistiĝis, entute kaj pro etnaj kialoj ankaŭ.“

²³ Konata estas nur unu kazo, kiam en 1956, la jaro de la hungara ribelo, estis aperigita en *Esperanto* helpalvoko de la aŭstra ĉefdelegito por kolekti monon por la hungaraj rifuĝintoj. Sed ĉu tiu helpo ankaŭ efektiviĝis estas nekonate.

La klopodo „en la etnaj lingvoj konigadi la avangardajn kontribuojn, per kiuj la Esperantaj lingvo, movado kaj kulturo delonge helpadis plifortigi la lingvojn kaj komunumojn, kreante pontajn rilatojn inter diversaj homaj lingvoj kaj kulturoj kaj fortigante etoson de reciproka akceptemo,“ ja estas nobla tasko, sed ĉu la averaĝaj esperantistoj komprenos, adoptos kaj efektivigos ĝin en tiu alta ideala senco, restas dubinde. Konante la Esperanto-movadon, oni scias, ke la averaĝaj Esperanto-„klubanoj“ preferas ĉefe okupiĝi pri aktivecoj kiel kartludi aŭ kvizi, kanti popolkantojn, aŭskulti iujn raportojn kaj prelegojn kaj rigardi lumbildojn, eble legi iujn librojn aŭ fari turismajn ekskursojn. Esperanto ofte servas nur kiel preteksto por tiaj kunvenoj, en kiuj oni ofte krokodilas ankaŭ nacilingve post la „oficiala“ programo en Esperanto. La ĉi-koncerna taskaro, kiun starigas la Strategia Laborplano, do postulas altan intelektan nivelon, altgradan fakan kompetentecon kaj bonegan konon de la Esperanto-movado, -historio kaj -lingvo, pri kiuj la averaĝaj Esperanto-klubano malofte aŭ eĉ ne disponas kaj pri kio ili ofte ankaŭ tute ne interesiĝas. Do, la Strategia Laborplano grandparte ne taŭgas por tiuj „plebaj“ publikoj, kiujn intelektuloj kaj verkantoj de Strategiaj Laborplanoj ĝenerale ĉiukaze emas eviti. Ekzemple oni nepre malhelpu, ke lokaj Esperanto-kluboj sendu „leĝoproponojn“ al ministroj de siaj landaj instancoj, ĉar plej ofte temas pri diletanta agado de amatoroj kaj stranguloj, kiuj nenion komprenas pri politika kaj leĝodonaj proceduroj, sed kiuj havas la fiksan ideon enkondukigi desupre Esperanton.

Antaŭvidi, ke Unesko „espereble“ lanĉos la Jardekon de Lingvoj, estas spekulacia risko. Kio okazos, se Unesko ne lanĉos ĝin ? En tiu ĉi kazo la Strategia Laborplano de UEA komplete perdis sian senco, almenaŭ rilate tiun ĉi temon.

Estas dubinde, ĉu oni devas apartigi „la centran UEA“ disde la „pli larĝa“ UEA. Tia dispartigo, aŭ de iure, aŭ de facto, povus esti eĉ danĝera, ĉar ĝi povus krei elitecon ene de UEA, kiel ĝi fakte jam nun ekzistas ĉirkaŭ la estraro/komitato de UEA, kiu povas subite perdi la rilaton kun la „pli larĝa UEA“, do la ceteraj, kiuj povus senti sin neglektitaj kaj trompitaj de tiu elito (kiel tio parte jam nun reale okazas). Kasto – kun verda punkto sur la frunto – laŭ hinda maniero ne estus bezonataj.

Kial oni konstante emfazas, ke la aferoj estu „centraj“ ? En certaj landoj kun federisma strukturo la homoj pensas malcentre kaj do havas nenian komprenon pri „centra UEA“ kaj simile. Eĉ Hindio estas federacia ŝtato (ĉu nur surpapere ?). Cetere en Eŭropo la popoloj fariĝas pli kaj pli alergijaj kontraŭ la rigida brusela centrismo kaj preferas regionan kaj lokan individuecon.

La Strategia Laborplano estas karakterizita de stranga lingvaĵo kaj bizaraj esprimformoj, kiuj ne estas kutimaj en la Esperanto-lingvostilo – kelkaj ekzemploj: „Ebentavoloj“, „fleksebliĝo“, „unuavicigi kaj duavicigi la formalajojn“, „reliefigoj“, „landerprovinc-nivela“, „centra bazdokumento“, „esperantista kunkonstruado“. Krom tio, oni ne kutimas skribi en UEA Landa Asocio, sed Landaj Asocioj. Do jam lingve la tuta Laborplano postlasas strangan impreson.

Sensencaj balastfrazoj kiel „Ni proponas emfazi la laborojn mem kaj duaviciĝi la formalizaĵojn, kies celo estas ebligi la pluiron de la laboroj“ restis lasitaj en la dokumento, kvankam la verkintoj de la teksto ricevis la rekomendon de ekstere forstreki tiajn frazojn kaj trovi pli taŭgan formon. La kulmino de idiotisma skribmaniero estas tutaj alineoj kiel ekzemple tiuj ĉi: „La bazaj principoj de la organiza fleksebliĝo estas: eksplicite kaj kolektive difini celojn sur ĉiu nivelo de la agado; identigi la metodojn, rimedojn kaj ekstermovadajn partnerojn kaj la financajn rimedojn, per kiuj labori al tiuj celoj; plani kaj plenumi la laboron (PD konsentas aldoni: per tiuj metodoj kaj rimedoj kaj kun tiuj partneroj, kaj) surbaze de la kapabloj kaj limoj de tiuj individuoj, kiuj agas.“

Aŭ: „Tiuj A-komitatoj, kiuj reprezentas la landajn asociojn ĉe UEA, duonformale organizu sin en specifa listo kiel apartan grupon ‘landa asociaro’. Ĝi konsistu el tiuj A-komitatoj plus sisteme elektataj reprezentantoj por la regionaj komisionoj kaj por enlandaj movadoj sen A-komitato.“ Ĉu iu komprenas pri kio temas ?

Aŭ: „...hibride inter la membreco kaj la simpla klienteco kaj mesaĝante tiamaniere ke tiuj ‚klientaj membroj‘ sentu apartenon.“ Kion signifas „hibride“ kaj kion signifas „klientaj membroj“ ?

Kial fondi novajn strukturojn kiel „Esperanta Stud-Fondaĵo“ aŭ „Strategia Forumo de la Esperanto-Komunumo“, se ekzistas sufiĉe multaj malnovaj strukturoj, kiuj estas neglektataj kaj preskaŭ ne plu funkcias pro manko de gvido, ideoj, rimedoj, resursoj, kunlaboro, membroj ? Unue oni funkciigu kaj refreŝigu unuopajn ekzistantajn komisionojn de UEA antaŭ ol fondi novajn fikciajn organizaĵojn prezidatajn de la eterne samaj fanfaronuloj kaj diletantoj.

Mencii Eroŝenkon signifas esti ne nur blinda pri la realecoj en la Esperanto-movado, sed nostalgii pri praktikoj jam delonge eksaj. Por blinduloj, kiuj estas lasitaj de la Esperanto-movado al sia propra sorto, UEA provizas neniujn servojn. Prefere oni ‚reliefigu‘ la ideojn de Hodler, Privat, Lapenna, Tonkin kaj aliaj gravaj strategoj de la Esperanto-movado, referencu al iliaj teoriaj verkoj kaj praktike eltiru la konsekvencojn el iliaj konsideroj. La Strategia Laborplano povus baziĝi pli klare ekzemple sur la konsideroj de la verko „Lingvo kaj popolo“ de Humphrey Tonkin. Li ja ne celis vane verki ĝin por la propra plezuro, sed por ke la esperantistoj pripensu liajn konsiderojn kaj eventuale eltiru el ili iujn konsekvencojn.

Lige kun tio - eĉ unu aludo pri necesaj reformoj en Universala Esperanto-Asocio ne troviĝas en la nova Strategia Laborplano. Kaj multaj gravaj konsideroj de plej diversaj komitatoj kaj (neelektitaj kandidatoj), kiuj estis prezentitaj en *Libera Folio*, estas simple ne reflektataj, sed krude ignorataj.

Komplete forgesitaj estis en la Strategia Laborplano la aparta emfazo de la graveco de la esperantologia kaj interlingvistika agado, kiel tio okazis en la antaŭa Strategia Laborplano, se oni jam „eksplicite“ mencias diversajn sferojn de la

planlingva kaj esperantista agado. Tio estas stranga, ĉar Dasgupta laŭdire mem estas esperantologo aŭ interlingvisto, redaktoro de LPLP ktp. Ĉi tiuj nocioj nepre devus ekzisti en tia grava kaj vojmontra dokumento, same kiel ‚Aktivula trejnado’, ‚Landa agado’ kaj ‚Eksteraj rilatoj’, de jardekoj la ‚sanktaj bovinoj’ de UEA. He, Dasgupta – ĉu vi ne aŭdis: sanktaj bovinoj ? Ĉu neniu rimarkis tiujn mankojn kaj forgesojn ?

Strange, ke mankas ankaŭ mencio pri la „gravega“ Praga Manifesto (1996), tiu ĝis nun plej „fekunda idearo“ (Vergara) de UEA, kiu devintus konduki la Esperanto-movadon en la 21an jarcenton, sed pri kiu apenaŭ plu iu parolas aŭ interesiĝas. Ankoraŭ en la antaŭa Strategia Plano ĝi estis ĝia integra parto, ĝiaj principoj proklamitaj kiel validaj. Ĉu ĝia nemencio en la nova Strategia Laborplano estas intenco aŭ forgeso, kaj ĉu per tio la Praga Manifesto, kiun Dasgupta antaŭ nelonge sur la paĝoj de *Spegulo* kaj aliloke ankoraŭ defendis per ĉiuj manoj kaj piedoj, estis de li mem definitive entombigita ?

Se fondi efikan „Strategian Komisionon“ laŭ la propono de Mark Fettes, ni opinias, ke ĝi ne devus konsisti nur el UEA-komitatoj, kiuj pri tiuj demandoj ĉiukaze ne kompetentas, sed el diversaj ‚strategie’ pensantaj fakaj personoj, kiuj konas la problemojn de UEA kaj la historion de la Esperanto-movado kaj kiuj kapablas enkonduki konkretajn ŝanĝojn kaj reformojn en tiu movado. Post la observo de la nekvalifikita diskuto, kiu okazis inter kelkaj komitatoj pri ĉi tiu temo, ni dubas ĉu la personoj, kiuj proponas sin kiel membrojn en tiu komisiono, plenumas tiujn kondiĉojn. Ke la ad hoc-propono de Fettes ne estis matura, pruvas la sinteno de la havana UEA-komitato, kiu indiferece rilatis al tiu ideo, malgraŭ antaŭaj pubertecaj flatgratulaj esprimoj en la komitata retlisto al la adreso de ĝia inventinto.²⁴

Lingvaj Homaj Rajtoj

Ho kia bombasta temo ! Kian konkretan „koncepton pri „Lingvaj Homaj Rajtoj“ oni volas disvastigi ? Ĉu tiuj „Lingvaj Homaj Rajtoj“ estas ie difinitaj, ekzemple el esperantista vidpunkto ? Ŝajnas, ke parto de la esperantistaro ne komprenas pri kio temas (kiel montris enketo, pri kiu estis raportite en *Libera Folio*, vd. sube). Anstataŭ proklami la neceson disvastigi ian abstraktan, aŭ nebulan „koncepton pri Lingvaj Homaj Rajtoj“, oni prefere klarigu tiujn Lingvajn Homajn Rajtojn kaj fondu laborgrupon por rediskuti la temon. Unu el la referencoj povus esti la artikolo ‚Homaj rajtoj, lingvaj homaj rajtoj kaj Esperanto“, kiun Renato Corsetti publikigis en la festlibro Blanke (2001), kiun oni cetere trovas en interreto. Sed ĉu sufiĉas la frazo de Zamenhof „...la lingvo internacia ne sole ne povas malfortigi la lingvojn naciajn, sed kontraŭe, ĝi sendube devas konduki al ilia granda fortiĝado kaj plena ekflorado“, kiun Corsetti trovis en ‚Esenco kaj estonteco’, por pravigi la prioritatan agadon pri lingvaj homaj rajtoj en UEA ? Tre dubinde ! Estas facile (kaj danĝere) arbitre ĉerpi iujn ajn frazojn el la Zamenhofa verkaro (sen kunteksto) por laŭplaĉe interpeti kaj (mis)uzi ilin por la pravigo de propraj dubindaj asertoj. La veraj

²⁴ Vd. <http://groups.yahoo.com/group/komitato-de-uea/messages/5780?l=1>

humanismaj intencoj de Zamenhof kaŝiĝas en lia hilelismo/homaranismo, sed tion oni kompreneble ne mencias en tiaj artikoloj, ĉu intence aŭ pro manko de scio ne estas klare.²⁵

Denove: La prioritata tasko de la Esperanto-movado kaj de UEA estas altigi la kvantan kaj kvalitan nivelon de la esperantistoj kaj ne promocii „Lingvaj Homajn Rajtojn“, despli ke UEA evidente ne disponas pri la taŭga teoria argumentaro kaj la praktika rimedaro. Bedaŭrinde, UEA nur fantazias pri tiuj lingvaj homaj rajtoj, sed neniu vere serioze okupiĝas pri tiu temo, verŝajne ĉar ĝi estas tro politikeca. Tio kaŭzas dilemon al UEA, kiu estas politike neŭtrala organizo. Se la Esperanto-movado volus okupiĝi pri lingvaj homaj rajtoj, tiukaze ĝi devus alpreni politikajn vidpunktojn por aŭ kontraŭ sintenoj, ekzemple de registaroj, kiuj subpremas laŭ klasika maniero etnajn malplimultojn (kiel ekzemple en Vjetnamio, kie UEA kongresos en 2012); alivorte: kiu diras A, tiu devas diri ankaŭ B. Sed kiel konate, la Esperanto-movado, kaj precipe UEA, tre malvolonte alprenas politikajn vidpunktojn, ja ĝi timas ilin same kiel la diablo timas la konsekritan akvon. En la kazo de evidente pekantaj registaroj, kies favoron oni serĉas por okazigi la Universalan Kongreson, oni fere silentas pri homaj rajtoj. Ekzemploj abundas, kie UEA malgraŭ politikaj duboj kongresis, petante

²⁵ En la Hilelismo/Homaranismo de 1906 Zamenhof skribis pri la lingvaj rajtoj jenon: 2. „Mi kredas, ke ĉiuj popoloj estas egalaj... Ĉian ofendadon aŭ persekutadon de homo pro tio, ke li naskiĝis de alia gento, kun alia ligvo aŭ religio ol mi, mi rigardas kiel barbarecon.“; 3. Mi kredas, ke ĉiu lando apartenas ne al tiu aŭ alia gento, sed plene egalrajte al ĉiuj ĝiaj loĝantoj, kian ajn lingvon aŭ religion ili havas; la intermiksadon de la interesoj de lando kun la interesoj de tiu aŭ alia gento, lingvo aŭ religio mi rigardas kiel restaĵon de la tempoj barbaraj...“; 4. Mi kredas, ke en sia familia vivo ĉiu homo havas plenan, naturan kaj nedisputeblan rajton, paroli kiam lingvon aŭ dialekton li volas..., sed en komunikigado kun homoj de alia deveno li devas, kiom ĝi estas ebla, uzadi lingvon neŭtrale-homan. ... Ĉiun celadon de unu homo, altrudi al aliaj homoj sian lingvon aŭ religion, mi rigardas kiel barbarecon.“ 7. Mi konscias, ke en tiuj landoj, kie la loĝantaro estas plimalpli unugenta, ĝi longan tempon ne komprenos la maljustecon de regado de unu lingvo aŭ religio super la aliaj kaj ĝi per ĉiuj fortoj batalados kontraŭ le egalrajtigo de ĉiuj lingvoj kaj religioj, kaj la defendantojn de tiu ĉi egalrajtigo ĝi persekutados kaj superĵetados per koto. Sed mi neniam konfuziĝos per tiu ĉi persekutado, memorante, ke mi batalas pro absoluta vero kaj justeco, ke nenia popolo povas scii, kio fariĝos kun ĝi morgaŭ, ke la egalrajtigo de ĉiuj lingvoj kaj religioj forigos la kaŭzon de ĉiuj militoj kaj malpacoj inter la popoloj, ke ĉia ago kontraŭ la devizo ‚la regno por la regnantoj‘ kaj ĉia perfortaĵo de unuj regnantoj kontraŭ aliaj restas ĉiam perfortaĵo, eĉ se ĝi estas farata de grandega plimulto kontraŭ malgrandega malplimulto, kaj ke fortika feliĉo de la homaro estas ebla nur tiam, kiam por ĉiuj popoloj kaj landoj ekzistos justeco egala kaj absoluta, dependanta nek de loko, nek de tempo, nek de forto, kaj kiam en ĉiu regno ekzistos nur homoj kaj regnantoj kaj ne gentoj.“ 8. „Mia nacio mi nomas la tutecon de ĉiuj homoj, kiuj loĝas mian patrujon, de kia ajn deveno, lingvo aŭ religio ili estas; ...“ 9. „Mia lingvo mi nomas tiun lingvon, kiun mi persone plej bone scias kaj plej volonte parolas, sed al la nomo de tiu ĉi lingvo mi devas ĉiam aldoni la vorton ‚hilelista‘, por montri, ke mian lingvon mi ne rigardas kiel mian idolon kaj ke mia idealo estas lingvo neŭtrale-homa. ... En mia familia vivo mi povas uzadi kiun lingvon mi volas, sed mi devas ĝin nomi ne mia nacia, sed nur mia lingvo familia. Kiam oni demandas min pri mia lingvo nacia, mi devas respondi: ‚La ekzistadon de lingvoj naciaj mi ne konfesas, ĉar ĉiu nacio nuntempa parolas per multaj lingvoj; sed mia lingvo genta estas jena (nome tiu lingvo aŭ dialekto, kiun en mia patrujo parolas la plimulto de mia gento, se eĉ mi mem tute ne posedus tiun ĉi lingvon).“ Jen ĉi tiujn frazojn de Zamenhof necesas citi kaj analizi parolante pri lingvaj homaj rajtoj en la senco de Zamenhof. Sed ĉar la esperantistoj ĝenerale ignoras la hilelison/homaranismon, ili ne bone komprenas la lingvaj homajn rajtojn en la senco de Zamenhof kaj do komencas fantazii kaj skribi nebulaĵojn pri ĉi tiu temo (kiel Corsetti, Dasgupta kaj aliaj).

la favoron de la oficialaj registaroj, kaj la plej juna kazo estas Kubo.²⁶ Dum oni kaŝolas krimajn registarojn, ne ekzistas ekzemploj, kie UEA apogis (minacatajn) etnajn nacimalplimultojn (judojn kaj ciganojn en orienta Eŭropo, tibetanojn en Ĉinio, indianojn en Brazilo, praloĝantojn en Aŭstralio kaj Kanado, ktp.).²⁷ Escepto eble estas IKEL, faka asocio de UEA, kie engaĝitaj individuoj atentigis pri malrespektoj de la rajtoj de minacataj etnaj minoritatoj. Por UEA tiu fakasocia kanalo, kiu kovras la malŝatatan kaj evitan temon, ŝajne sufiĉas. Do, la Esperanto-movado povas pretendi nenian meritojn pri subteno favore al „homaj rajtoj“ koncerne etnajn minoritatojn aŭ helpo al ili en kazo de ekzista minaco. Daŭre ekzistas granda aro de etnaj minoritatoj sur ĉiuj kontinentoj, kiuj estas subpremataj aŭ diskriminaciaj de aliaj etnaj grupoj aŭ de registaroj – ŝajnas, ke UEA tio lasas indiferenta. Cetere, en la menciita artikolo Corsetti mem ne kapablis klarigi kio estas aŭ estu lingvaj homaj rajtoj, sed li preferas resti ĝenerala kaj polemiki kontraŭ Usono, kiu laŭ li mem ne respektas la homajn rajtojn, kvankam ĝi daŭre fanfaronas pri ili. Laŭ Corsetti la lingvaj homaj rajtoj estas „ankoraŭ naskota bebo“. Ĉu ĝi do intertempe naskiĝis oni ne scias. Cetere, ekzistas la *Universala Deklaracio pri la Lingvaj Rajtoj* (Barcelono 1996),²⁸ sed en interreto oni trovas relative malmultajn resursojn pri lingvaj homaj rajtoj,²⁹ pri kiuj ŝajne okupiĝas iuj efemeraj akademiecaj intelektuloj-lingvistoj³⁰ kaj iuj neregistaraj organizoj, kiuj malkovris kaj prilaboras tiun niĉon.³¹

Mi mem ne estas kontraŭ „Lingvaj Homaj Rajtoj“ kaj estus eĉ elektinta tiun titolon kiel moton por la nova Strategia Laborplano.³²

²⁶ Pere de la kongresa kuriero eĉ okazis plumpa provo kaŝoli la kuban registaron kaj turni la lancon kun atako kontraŭ tiuj, neduble eĉefe Usono, kiuj laŭdire aplikas „teroron“ kontraŭ Kubo. Ĉi tia grava kaj samtempa groteska malrespekto de la politika neŭtraleco estas neniel tolerebla.

²⁷ Lastatempe aperis retpaĝaro dediĉita la Lingvaj Homaj Rajtoj en ligo kun la UEA-simpozio en 2008 sub la jena adreso: <http://www.linguistic-rights.org/en/about.html>. Ĉi tie oni trovas iun tekston pri „La starpunkto de UEA pri lingvaj rajtoj“: <http://www.lingvaj-rajtoj.org/eo/lingvaj-rajtoj.html>. Pri lingva imperiismo ekzistas jena vikipedia paĝo: http://en.wikipedia.org/wiki/Linguistic_imperialism.

²⁸ Vd. la retejon <http://www.linguistic-declaration.org>. Esperanta-traduko sur <http://www.esperantio.net/index.php?id=19>. UEA ne subskribis ĝin, sed Esperanta PEN Centro.

²⁹ En la esperanta Vikipedio oni trovas nur magran tekston sur http://eo.wikipedia.org/wiki/Lingvaj_rajtoj. Iom pli malmagra estas la anglalingva versio. En la Esperanta versio necesus ĝuste aldoni la supre cititajn frazojn el la Zamenhofa hilelismo/homaranismo.

³⁰ Pli malpli la solaj fakuloj, kiuj okupiĝas pri tiu temo, estas Tove Skutnabb-Kangas kaj ŝia edzo Robert Phillipson, kies libron „Linguistic Human Rights: Overcoming Linguistic Discrimination“ oni cetere trovas en Google Books. Esperanto estas kurte menciita sur p. 184, sed evidente ne ludas rolon en la faka diskurso (bone, la libro datiĝas de 1994). Pli aktualajn materialojn vd. sur: <http://www.linguistic-rights.org> kaj <http://www.tove-skutnabb-kangas.org>.

³¹ Kiel Amnestio Internacia aŭ Societo por Minacataj Popoloj, por nomi la plej eminentajn.

³² Lingvaj rajtoj estas klarigitaj ankaŭ en la broŝuro „Kion ni estas kaj kion ni celas. Komentoj pri la Manifesto de la movado por la internacia lingvo Esperanto“ (redaktita de Renato Corsetti kaj Osmo Buller), UEA 1999, pp. 16-18. Tie Uwe Joachim Moritz, probable unu el malmultaj fakuloj pri lingvaj kaj minoritataj rajtoj en la Esperanto-movado, atentigas, ke „Evidente, ĉi tie temas pri rajtoj ne de lingvoj, sed pri la rajto de homoj plene uzi sia(j)n lingvo(j)n en ĉiuj vivsektoroj kaj sur ĉiuj niveloj.“ Kaj sekvas daŭre aktuala kritiko: „La ĝenerala Esperanto-movado ankoraŭ ne konscias pri la dua dimensio de la tutmonda lingvo-problemo. Se la uzantoj de la internacia lingvo pledas por la rajto libere utiligi sian

Anstataŭ daŭre tiom esperege kaj flateme alkroĉiĝi al Unesko, kiu eĉ unu eŭron dum la jaro ne sendas en la kason de UEA, kiel la Centra Oficeno konfirmis mian demandon (junio 2010), prefere UEA serĉu kaj konkrete intensigu la rilatojn kun aliaj unuopaj neregistaraj organizaĵoj en kaj ekster la UN-sistemo, kiuj defendas similajn homrajtajn celojn aŭ kiuj eĉ simpatias kun la Esperanto-movado. Eĉ unu konkreta ekzemplo de tia organizaĵo ne estas menciita en la Strategia Laborplano, kiu povus esti konsiderata por tia kunlaboro. Fakte ekde la komenco UEA neniam kapablis reale kunlabori kun aliaj gravaj neregistaraj organizoj kaj do ankaŭ ne devas miri, se ĝi restas tute sola kaj izolita ene de la NRO-sistemo.

Pri Vikipedio: Ĉu Dasgupta ne sciis, ke seriozaj sciencistoj ne publikigas siajn verkaĵojn en Vikipedio, kies „altprofileco“, precipe en la kazo de la Esperanto-versio, cetere povas esti pridubata. Sekve, en multaj seriozaj sciencaj eldonaĵoj Vikipedio simple mankas kiel referenco.

La praktikojn de la „retaj membroj“ oni povis observi en la lastaj jaroj: Dum en retforumoj de UEA-membroj kaj UEA-komitato okazas plejparte sensignifaj banalaj kaj hontindaj palavradoj inter kelkaj „amikoj“, kiuj flataĉas unu la aliajn, la solaj pli malpli inteligentaj kontribuaĵoj okazas tra *Libera Folio*, kiu neniel estas ligita kun UEA aŭ aliaj Esperanto-organizo. Estus dezirinde posedi plurajn tiajn retgazetojn, por rompi la monopolon de unusola.

Ekzemple la ĉi-sekva alineo ŝajnas esti tiel baza kaj fundamenta por la laboro de ĉiu organizo, ke oni eĉ ne devus eksplicite menci ĝin, au se tamen, tiam en alia, pli inteligenta formulo: „La Estraro de UEA funkciigu komisionon pri informado por kunordigi la agadojn sur ĉi tiu kampo. Tiu komisiono mastrumu la produktadon kaj ĝisdatigadon de profesi-nivelaj informmaterialoj pri Esperanto kaj ĝia movado, transdoneblaj (post traduko kaj laŭlanda adapto) al la ĵurnalistoj, lingvistoj, simplaj interesiĝantoj ktp. Tiu komisiono kreu informmaterialon ne nur pri Esperanto sed ankaŭ specife pri UEA por mondaj celgrupoj (UN, Unesko, aliaj tutmondaj institucioj, internaciaj konferencoj). La komisiono flegu homfortojn kaj mastrumu eventojn, por ke la centra UEA povu en tiaj medioj inde prezenti al la publiko la Esperanto-movadon kaj ĝian kulturalan rolon.“ La tuta sermo estas daŭrigita en tiu maniero: „La landaj asocioj kaj regionaj komisionoj interŝanĝu spertojn kaj planojn pri informado al la ekstera publiko en la etnaj lingvoj.“ Brrr. Tiuj frazoj respegulas ne nur la etoson en infanĝardeno, kie la vartistino devas dikti al ĉiu infano, kion li aŭ ŝi devas fari, sed sonas en niaj oreloj ankaŭ kiel la malharmonia metalmuziko de la alplandaj karnavaloj.

Al la esperantistoj, lokaj kluboj kaj Landaj Asocioj oni ne devas baze klarigi, ke ili verku informmaterialon, kontaktu aliajn organizaĵojn aŭ „akcelu la produktadon de lerniloj...kie ili mankas“ aŭ ke „retaj kursoj kaj hejmpaĝoj ...ricevu emfazon“. Ili jam scias tion. Sed oni prefere klarigu al ili *kiel, kiamaniere* ili praktike faru tion. Tiaj

propran lingvon, ili nepre ne fermu la okulojn antaŭ la diskriminacio praktikata interne de la plej multaj ŝtatoj.“

alineoj sonas tiel kvazaŭ UEA estis ĵus fondita kaj bezonas nun diskuti pri la starigo de komisionoj, ekzemple pri informado aŭ scienca agado.

La alineo pri ESF ktp., kiu „konsiliĝe kun la uzantoj de lernu.net, ŝtupe lanĉu modere pagatajn aldonajn servojn kaj integri tiajn aranĝojn en la financan strukturon de UEA“ sonas kiel dikto al fremda organizo, kiu estas memstara fondaĵo, sed kiun Dasgupta konsideras kiel la financiston de UEA kaj de la projektoj ligitaj kun ĝi.

Eble la sola taŭga frazo en la Strategia Laborplano estas tiu ĉi: „La celo estas, ke la publiko kapablu pli juste taksu la historian kontribuon de la Esperanto-movado al la kulturo de la unuopaj landoj kaj de la mondo.“ Por atingi tion necesas komplete aliaj formoj de agado ol Dasgupta kaj la kunverkintoj de tiu Laborplano povas imagi. Ekzemple la revuo *Spegulo* per diversaj studoj kaj artikoloj klopodis kontribui al tio, ke „la publiko kapablu pli juste taksu la historian kontribuon de la Esperanto-movado“. Ŝajnas, ke nur malgranda grupo de klarvidaj esperantistoj, kiuj pli kaj pli komprenas la malfacilan situacion de la Esperanto-movado kaj de UEA, atentis la konsiderojn de *Spegulo*, dum en la Estrara Raporto de UEA kaj Strategia Laborplano de UEA ili estas komplete ignoritaj.³³

La restan balaston de la nova Strategia Laborplano, verkitan sur neniuj movada analizo kaj surbaze de neniuj fakaj kaj sciencaj referencoj, mi eĉ ne deziras komenti, ĉi tiu teksto simple kaŭzas tro da embaraso kaj ĉagreno. En tiu Laborplano komplete mankas trafikaj receptoj kiel oni partoprenu kiel Esperanto-movado en la grandaj internaciaj intelektaj interŝanĝoj, kio estus la plej grava kondiĉo por altigi la ŝancojn de la lingvo Esperanto ludi iun rolon en la internacia vivo. Anstataŭ tio regas skurila sektemo, pseŭda eliteco, naiva idealismo kaj paranoja supertakso de la propraj subjektivaj konvinkoj, kiuj en tiu internacia vivo apenaŭ ludas gravan rolon.

La Strategia Laborplano abrupte finiĝas per ia cetera direktivo, kiun oni povus menciigi ankaŭ pli supre. Komplete mankas konkludo, resumo, postparolo, epilogo, fino.

Alvokoj kiel „Nia ĉefa tasko por la jardeko estas levi la profilon de Esperanto kiel aparte taŭga ilo por krei kaj konstantigi tian prilingvan konscion kun interkomunuma dimensio“ restos do nur malplenaj frazaĵoj, kiuj perdas ĉian sencecon kaj per kiuj oni neniel kapablos levi la profilon de Esperanto. Male: En la venonta jardeko rapide forpasos multaj veteranoj pro la atingo de la aĝlimo, kio signifas, ke oni devos enkalkuli drastan ŝrumpon de la membraro. Estas la tasko de sociologoj kaj historiistoj kalkuli kiam tiu peripetio reale okazos. Anstataŭado kaj refreŝado de tiuj membraroj ne estas antaŭvideblaj.

Kie do estas niaj plej saĝaj kaj inteligentaj mensuloj, kiuj povus malrekomendi la akcepton de ĉi tia diletanta Strategia Laborplano, kiu en si mem reprezentas nuran embarasan pseŭdointelektan fikcion? Kial ili ne evitas tiun varman

³³ Bedaŭrinde, *Spegulo* estas ĉesigita fine de 2010 de la pola eldonisto laŭdire pro „ekonomiaj“ kialoj.

aeron, haltigas tiun ŝaumbatadon, kiu nur ridindigas la Esperanto-movadon ? La mankanta diskuto pri tiu Strategia Laborplano ja ankaŭ signalas kaj signifas, ke neniu plu en la Komitato de UEA kaj entute en UEA havas la kapablon kaj kuraĝan kontraŭstari tiajn fuŝnaskitajn projektojn kaj ke neniu interesiĝas pri taŭge verkita Strategia Laborplano. La plej nova fuŝa kaj fiaskinta majstroverko de Probal Dasgupta probable lasos eĉ la komitaton kaj membraron de UEA indiferenta, kiu verŝajne jam delonge perdis la iluziojn pri la fina venko de Esperanto, eĉ se en enketoj oni konfesas la inversan opinion. Gravas postlasi iujn personajn spurojn en la movado por esti admirata, laŭdata kaj aplaŭdata de ĉiuj flankoj.

Riproĉinde al Dasgupta ne estas, ke li provis krei novtipan Strategian Laborplanon, kiu videble distanciĝas de la rigida skemo „informado, instruado, utiligado“ el la tempo de Lapenna. Kvankam tiuj nocioj restis konservataj dise ankaŭ tra la nova Strategia Laborplano, riproĉinde al Dasgupta estas, ke li detruis ĝian antaŭan koheran strukturitan koncepton kaj parte ellasis ideojn, kiuj daŭre validas, farante malbonan kopion de la antaŭa Strategia Laborplano, ĉerpante nur elementojn, kiuj konvenis al li kaj eliminante erojn, kiuj evidente ne plaĉis al li. Ĉi tio estas nek komprenebla, nek akceptebla kaj pruvas, ke Dasgupta verŝajne malmulte komprenis pri la ideo fiksa kaj perata de la antaŭa Strategia Laborplano, kiu en si mem estis taŭge verkita. Mia rekomendo daŭre utiligi tiun malnovan laborplanon kaj adapti ĝin nur per la plej necesaj aktualaĵoj, bedaŭrinde estis ignorita.

Alia demando estas, ĉu la celaro de la antaŭa Strategia Laborplano estis entute atingita ? Ĉu la antaŭvidita analizo estis farita – ekzemple pri la „nova kampanjo ‚Al lingva demokratio‘, pri la „profesiigo“, „plijuniigo“, „tutmondiigo“ kaj „malfermiigo“ de la Esperanto-movado, kiu laŭte estis anoncita en la antaŭa Strategia Plano ? Kiuj rezultoj el tiuj kampanjoj estis videblaj ? Necesus tralegi ĉiujn ĉi-koncernajn raportojn publikigitajn en Estraraj Raportoj kaj en la revuo *Esperanto*. Ĉu la Komitato estis „informita pri la progreso de la laboro minimume ĉiun trian monaton“ ? Ĉu la Komitato „pritis la atingojn de la plano“ ?

La plej gravaj frazoj en la antaŭa Strategia Laborplano estis inter alie: „Esperanto estos rigardata kiel vera lingvo, kiam ĝi estos utila ankaŭ por atingi ĉiuspecajn celojn de la homa vivo“ kaj „La Esperanto-movado ne devas resti fermita klubo, sed rimarkebla parto de la normala vivo de la ĉirkaŭa socio“. Tiuj nekontesteblaj kaj nerenverseblaj veroj simple mankas kiel filozofia platformo en la nova Strategia Laborplano. Tiajn simplajn verojn necesus rekonscii al la homoj. La sama principo validas por la punkto „Demokratiigo de la vivo de UEA kun pli da respekto por ĉiuj agantoj je ĉiu nivelo.“ De ĉi tiu demokratiigo en UEA, kie malgranda koteria grupo de personoj ĉion decidas, estas nuntempe tre malmulte sentebla.

Por estontaj Strategiaj Laborplanoj mi rekomendas la skemon laŭ la agadkampoj de la estraranoj de UEA: Ĝenerala planado, Kulturo, Kongresoj, Edukado, Informado, Financoj, Eksteraj Rilatoj, Landa kaj Regiona Agado, Faka kaj Scienca Agado, Aktivula Trejnado, Junularo, ktp.

Magra kaj banala kongresrezolucio

La ĉijara havana kongresrezolucio probable estas la plej banala kaj enhave malplena en la historio de la UK-rezolucioj.³⁴ Ĝi klare montras, ke

1. UEA havas nenion plu interesan por mesaĝi kaj elĉerpis sian teman rezervaron.
- 1a. En UEA neniu plu kapablas verki seriozan rezolucion.
- 1b. Ke oni evitas la vortojn „homaj rajtoj“, despli speciale en la kuba kunteksto.
2. Ke de Unesko UEA nenion plu atendas kaj nenion plu povos atendi.
3. Ke entute UEA prezentas sin kiel sensignifan organizaĵon.

Hodiaŭ, ĉiu ajn internacia kongreso kunigas homojn el plej diversaj landoj tra la mondo, plej ofte pere de a angla lingvo, kaj konstruas pontojn kaj stimulas komprenemon inter popoloj - do eksplicite menci tiujn ĉi faktojn estas superflue, eĉ en la kazo de internacia Esperanto-kongreso. La rezolucio de antaŭ 20 jaroj ŝajnas al ni multe pli interesa.³⁵

Enketo pri kongreslandoj, neŭtraleco kaj lingvaj rajtoj

En printempo 2010 mi efektivigis inter la delegitaro de UEA privatan enketon kun kelkaj demandoj inter alie rilate al la ĉijara kongreslando Kubo, lige kun la neŭtraleco de UEA. La delegitoj estis invitataj respondi kvin demandojn. Laŭ la ne tute surpriza rezulto de tiu enketo, pli ol tri el kvar delegitoj de UEA subtenis la okazigon de Universala Kongreso en Kubo, malgraŭ la fakto, ke la Homrajta konsilio de UN kritikis la landon pro ĝia drasta malrespekto de la homaj rajtoj. Preskaŭ same multaj delegitoj konsentis, ke UEA ankaŭ estonte okazigu kongresojn en similaj landoj. Aliflanke ĉiu dua respondinto opiniis, ke UEA devus publike postuli, ke la koncernaj landoj respektu la homajn rajtojn. Multaj delegitoj ankaŭ aldons personan komenton. En julio la retgazeto *Libera Folio* faris kontribuon pri tiu enketo.³⁶ La plena raporto pri tiu enketo estas elŝutebla sub la retadreso: http://www.planlingvoj.ch/Enketo_UEA-delegitoj_2010.pdf.

Povra ILEI

Sur la retpaĝoj de UEA kaj ILEI oni povas legi jenan blablablaon: „43-a Konferenco de ILEI sukcese pluiras en Matanzas, Kubo. La partoprenantoj de la instruista trejnseminario sekvas intensan programon kaj plenumas pezajn hejmtaskajn devojn, sed ĉiam kun entuziasmo kaj ĝojo.“ La leganto de tiu komuniko ŝatus ekscii, en kio konkrete konsistis la „intensa programo“ kaj la „pezaj hejmtaskaj devoj“ en kondiĉoj de „tra agrable varmeta akvo“. Rilate la „plurajn kunsidojn pri la estontaj perspektivoj por ILEI“, dum kiuj „leviĝis valoraj ideoj“ oni ŝatus ankaŭ ekscii kiel

³⁴ Ĝian tekston vd. <http://www.liberafolio.org/2010/elstare-kurta-kongresa-rezolucio>

³⁵ Ĝian tekston vd. <http://www.liberafolio.org/2010/komitatanoj-provis-haltigi-sangon-de-redaktoro#1279965664>

³⁶ <http://www.liberafolio.org/2010/ciu-dua-delegito-de-uea-pretas-admoni-kubon>

tiuj perspektivoj aspektas. Kaj se jam „grave estas semi planojn por resti en kontakto kun la nove renkontitaj kolegoj el Kubo kaj la ceteraj latinamerikaj landoj, por ke ILEI levu sian profilon en la kontinento“ oni povas esperi, ke tio ne restas nur intencoj kaj teorio. Reale ekzistas la risko, ke post la forveturo de la eŭropaj ĉefoj de ILEI el Kubo mankos fortoj, emo, kapacito, kapablo resti en kontakto kun la nove renkontitaj kolegoj el Kubo kaj la ceteraj latinamerikaj landoj. Do, oni nur povas esperi, ke „ĉi tiu konferenco sendube markas gravan punkton por la Ligo kaj ĝiaj tutmondigaj aspiroj.“³⁷ Post unu jaro mi revenos al tiu promeso por kontroli ĝin. Strange ankaŭ, ke ILEI akceptas decidojn senkvorume.³⁸ Jam tiu fakto indikas, ke devas temi pri malserioza organizo.

La kazo Löttsch kaj la problemo de la sekretaj agentoj

Pere de vaste disvastigata informo en la germana gazetaro meze de marto, iĝis konate, ke prof. d-ro Ronald Löttsch, elstara germana lingvisto kaj esperantisto, dum jardekoj sekrete kunlaboris kun la ministerio pri ŝtata sekureco (nomata Stasi). Ankaŭ tiu temo interesas nin kaj ĝi indus esti prenita pli profunde sub la lupeon, ĉar ĝi koncernas ankaŭ la Esperanto-movadon (ĉefe en la ekssocialismaj landoj). Ĉi tiu malkovro surbaze de esploroj en la GDR-arkivoj estis farita lige kun la kandidatiĝo de lia edzino Gesine Löttsch por la posteno de la kunprezidanto de la Maldekstra Partio de Germanio. Laŭ informoj de germanaj gazetoj, Ronald Löttsch dum pli ol dudek jaroj havis entute pli ol cent renkontiĝojn kun kunlaborantoj de Stasi, ĉefe por transdoni informojn pri siaj kolegoj. Ronald Löttsch ne estis simpla esperantisto, sed li havis gravajn funkciojn en GDREA, Germana Esperanto-Asocio (GEA) post la politika turniĝo kaj en Gesellschaft für Interlinguistik e.V., kiu estas prezidata de d-ro Detlev Blanke. Nek Löttsch, nek Blanke bonvolis komenti la riproĉojn kaj suspektojn.³⁹ En *Libera Folio* la leganto trovas pli da informoj pri ĉi tiu tikla temo, al kiu ni certe revenos en alia okazo.⁴⁰

La kazo Löttsch verŝajne signifas la pinton de la glacimonto de la sekretserva informa agado praktikata en GDR kaj en aliaj iamaj socialismaj landoj. Hans-Joachim Maaz, la aŭtoro de fama psikogramo pri GDR,⁴¹ supozas, ke krom la 85'000 oficialaj kunlaborantoj ekzistis verŝajne minimume duonmiliono da GDR-civitanoj, kiuj funkciis kiel ‚neoficialaj kunlaborantoj‘ (IM) de la Ministerio pri Ŝtata Sekureco (kaj ne nur 170'000 kiel ĝis nun taksate). Ĉi tiu okulfrapa aktuala kazo Löttsch liverus senperan kaŭzon por pli serioze okupiĝi pri la problemo de la spionado, pluinformato kaj

³⁷ <http://www.uea.org/dokumentoj/komunikoj/gk.php?no=388> kaj <http://www.ilei.info/novajxoj/mezvoje.php>; vd. ankaŭ <http://www.liberafolio.org/2010/ilei-konferencas-en-kubo>

³⁸ <http://groups.yahoo.com/group/komitato-de-uea/message/5816>

³⁹ Intertempe, Gesine Löttsch fariĝis kunprezidantino de la partio ‚Die Linke‘ kaj la kandidato por la ŝtatprezidenteco Gauck, kiun tiu partio ne subtenis, ne elektigis.

⁴⁰ <http://www.liberafolio.org/2010/pinta-esperantisto-en-gdr-kunlaboris-kun-stasi>

⁴¹ Hans-Joachim Maaz: Der Gefühlsstau. Ein Psychogramm der DDR. Berlin 1990, p. 21 (nova eldono C.H. Beck 2010). Ĉi tiun unikan psikanalizon pri la realsocialisma socio de GDR mi sugestas al UEA eldoni en Esperano-traduko kadre de la Serio ‚Scienca Penso‘.

denuncado en la iamaj socialismaj landoj. Mi do esperas, ke iam la historiistoj povos aliri la dokumentaron de la Birthler-instanco (iama Gauck-instanco) kaj de la pola IPN, eble ankaŭ de sovetiaj, hungaraj, bulgaraj k.a. arkivoj, por ekscii la veron pri la faroj de gvidaj Esperanto-funkciuloj en tiuj landoj, kiuj neniam traktis tiun temon publike kaj honeste kaj kiuj obstine silentas kaj rifuzas ajnan respondon, se ili estas demanditaj prie. Malgraŭ skeptiko pri la klopodo morale kondamni homojn, kiuj estas suspektitaj pro la kunlaboro kun la sekretaj servoj, la ideon konsulti la aktojn de Stasi eĉ apogas Ulrich Becker, kiu estis la plej lasta salajrata oficisto de GDREA, kiu bone konis prof. Löttsch, ja kiu ŝajnas „daŭre respekti“ lin kiel „bonan amikon“.⁴²

Do, ankaŭ ĉi tiu tikla temo, al kiu certaj koncernataj personoj kutimas ege alergie reagi, estas parto de la Esperanto-historio, tion ili almenaŭ devus konfesi, despli ke UEA forte „vetis“⁴³ je la Esperanto-movado en la iamaj socialismaj landoj (sed pri tio oni hodiaŭ ne plu fanfaronas). Oni ricevas la neeviteblan impreson, ke tiuj personoj timas kaj evitas tiujn tiklajn temojn kiel la diablo la konsekritan akvon.

Vivu la antiraŭmismo !

Por reveni al la humura parto de mia raporto – la tuta lastatempa evoluo en UEA kaj ĉirkaŭ ĝi estis kompetente kaj science analizita en ‚Heroldo Komunikas‘ (HeKo) de la Esperanta Civito, kun jena teksto: „Dum la Esperanta Civito spertas sian anabatan movon, kun kresko kvanta kaj kvalita (pri kiuj tamen ĝia Kapitulo ne fanfaronas, eĉ informas preskaŭ pogute), Sennacieca Asocio Tutmonda kaj Universala Esperanto-Asocio travivas la katabatan. La fenomenoj meritas ioman pristudon. La raŭmistoj klarigas la ascendon de la Esperanta Civito kiel naturan konsekvencon de la raŭmista metodo. Kaj klarigas la descendon de SAT kaj UEA kiel naturan mankon de apliko de tiu metodo. Efektive, en la diskutoj (praktike senfruktaj) pri la internaj krizoj de siaj respektivaj asocioj, la asocioj kondukas kvazaŭ ili eĉ ne konus tiun medikamenton por siaj malsanoj; kvankam pluraj scias, kio estas la Pakto, ĉar iuj SAT-estroj kaj UEA-estroj (ne ĉiuj, sed la plej bruaj) parolas malbone pri ĝi. Ili similas al Pinokjo malsana en la lito: kaj ĉar ili mensogas (unue al si mem, due al siaj membraroj) kaj ĉar ili rifuzas la medikamenton. Indas aldoni ke, en ĉi tiu varianto de la fabelo, neniu Bluhara Feino bezonas proponi sukeraĵon antaŭ la engluto de la maldolĉa kuracilo.“ Ŝajnas, ke La Konsulo komprenis la esencon: „La antiraŭmismo malbone pagas ankaŭ tutajn ensemblojn. La rondo de la liberfolianoj vigle kampanjis (ofte sincere kaj honeste, foje nur ambigue kaj ertleske) kontraŭ Probal Dasgupta, speciale, kaj kontraŭ tio kion „ministro“ Künzli⁴⁴ nomas la koterio, ĝenerale. La baloto pri la B-komitataneco pruvis, ke *Libera Folio* influas neniom la ĝeneralan opinion ene de UEA, kaj eĉ ke nerespondo al ĝia intervjuo estas garantio de sukceso (ĉina kandidato) aŭ almenaŭ de pli bona

⁴² Cetere, Becker nun loĝas en Usono, kie li gvidas la eldonejon Mondial, kiu eldonas ankaŭ literaturon en kaj pri Esperanto.

⁴³ Vorto uzita de Humphrey Tonkin, kiu en iu intervjuo kun Mark Fettes konfesis, ke kun Amadou Mahtar M’Bow, tiama ĝenerala direktoro de Unesko, „ni vetis sur la malĝusta ĉevalo“.

⁴⁴ Temas pri ĉi tiu burleskaĵo: <http://esperantarespubliko.blogspot.com>

rezulto ol la samlanda respondinto (kroata kazo). Ja tio estas la logika konkludo, se la disidentoj (jam sen dentoj) ne pravas ke okazis fraŭdo en la skrutinio.⁴⁵

Andreas Künzli,

individua membro kaj FD de UEA

septembro 2010

Ciferoj parolas klaran lingvon

Stagna evoluo de la membronombroj

Kiel Universala Esperanto-Asocio (UEA) antaŭ nelonge raportis, en la jaro 2009 la asocio havis 5713 individuajn membrojn (IM), dum en 2008 ilia nombro estis 5702. La plej multajn individuajn membrojn havis Francio (611; +28), Germanio (539; +5), Japanio (402; ±0), Brazilo (381; +44) kaj Usono (302; -12). Sekvas Nederlando (248; -6), Pollando (245; +125), Italio (195; -13), Rusio (165; -44), Belgio (155; -4), Britio (146; -7), Svedio (141; -13), Hispanio (138; -9), Finnlando (131; -5), Ĉinio (115; -12), Ĉeĥio (101; +19), Hungario (98; -15), Danio (97; ±0), Svislando (86; +1), Kanado (72; -3) kaj Israelo (65; -1).

La nombro de aligitaj membroj (AM), t.e. tiuj membroj de la landaj asocioj de UEA, kiuj ne estas IM de UEA, kreskis al 12'605 (+113). Plej multe da aligitaj membroj estis en Hungario 1570 (+222), Ĉinio 1051 (±0), Japanio 948 (+271), Germanio 806 (-26), Italio 741 (-36), Pollando 700 (+200), Usono 504 (+163), Belgio 443 (-37), Francio 418 (-135), Britio 350 (-15), Svedio 320 (+25), Kroatio 295 (+2), Korea Resp. 219 (+33), Nederlando 219 (+7), Brazilo 204 (-114) kaj Finnlando 203 (+1). Atentinda estas la konstato, ke ekzemple en Pollando draste kreskis la nombroj de individuaj kaj aligitaj membroj, same de la aligitaj membroj en Hungario kaj Japanio, ke en Usono la nombro de individuaj membroj falis, sed tiu de la aligitaj kreskegis, dum

⁴⁵ <http://www.esperantio.net/index.php?id=1336>

en Ĉinio ĉi restis kiel antaŭe. Strangaj ŝanĝoj. Ĉu temas pri artefaritaj manipuloj en tiuj kazoj ? Kial la cifero por Ĉinio restis senŝanĝa, kaj kie restis Kubo en tiu ĉi statistiko kun ĝia laŭdira amaseca karaktero de la Esperanto-movado ? Ekzistas multaj demandoj, al kiuj ŝajne neniu, ekzemple estrarano aŭ komitatano de UEA, povas aŭ volas respondi. La tuta membraro de UEA, t.e. aligitaj kaj individuaj membroj kune, do nombris 18'318 (+124). En la statistiko de ĉiuj membroj en 2009 suverene regis Hungario (1668; +207), sekvata de Japanio (1350; +271), Germanio (1345; -21), Ĉinio (1166; -14) kaj Francio (1029; -107). La nombro de landoj kun membroj de UEA kreskis de 121 al 124. 436 IM estis malpli ol 30-jaraj kaj sekve ili samtempe estis IM de TEJO. Kompare kun la antaŭa jaro temis pri malkresko de 32. El ĉiuj IM junaj estis 7,6%. (Dek jarojn pli frue, en 1999, la proporcio estis 9,7%.) El ĉiuj AM, junaj estis 1905 (-21). La junaj IM kaj AM sume nombris 2341. En 2008 tiu nombro estis 2394, tiel ke la malkresko de la tuta TEJO-membraro estis 53.⁴⁶

Estas klare, kaj tiun veron ni ne devas aparte emfazi aŭ ripeti, ke UEA eventuale devus posedi centmil membrojn aŭ prefere eĉ unu milionon, por ludi la rolon kiel internacie agnoskita premgrupo sur la kampo de la demando de la internacia neŭtrala planlingvo. Tien strukture tiom kompleksan asocion kun nur kvin ĝis sesmil individuaj membroj kaj dekok mil kolektivaj membroj en 124 landoj perdis el diversaj vidpunktoj plej verŝajne ĉian sencon. Ĉiu ajn pli granda neesperantista landa organizo havas multe pli da membroj.

Ŝrumpantaj abonombroj por la ĉefaj revuoj

La revuo *Esperanto* havis 3765 pagitajn abonojn (-95) kaj la junulara revuo *Kontakto* 735 (-110). Ĉi tiuj ciferoj parolas klartekston: UEA suferas stagnadon kaj la revuoj de UEA spertis reduktion de la abonantoj. Oni povus supozi, ke pro la enkonduko de la reta versio de la revuo *Esperanto* okazis ŝanĝo en la abonkategorioj. Ĉar se dum 2009 okazis averaĝe 331 elŝutoj de la reta versio (kun rekordo en decembro de 376), en 2010 estis faritaj 500 (januaro), 460 (februaro) kaj 380 (marto) elŝutoj. Do la marta cifero pli malpli atingis la nivelon de decembro 2009. Oni do vidus sufiĉe baldaŭ, ĉu la enkonduko de la reta versio kaŭzis pli oftan deziron kaj uzadon je tiu abonkategorio, aŭ ĉu malgraŭ tio ne okazis granda skuo ĉirilate. La ĉi-koncernaj ciferoj estis analizitaj kaj interpretitaj de la Centra Oficejo jene: En la lasta jaro de István Ertl kiel redaktoro, do en 2001, la revuo havis 4590 pagitajn ricevantojn (t.e. membroj en la revuoricevaj kategorioj plus tiuj, kiuj abonis ĝin sen membreco). En 2009 temis pri 3765, do en la tuta periodo okazis falo de 825. Tio estas falo de 21,9%. Samtempe la nombro de la individuaj membroj falis de 6479 al 5713, t.e. -766. Tiu falo estas 11,8%. Temas pri grava evoluo, al kiu necesus doni atenton. Se la revua nombro malkreskus nur pro tio, ke la membraro ĝenerale malkreskis, la proporcia falo de la revuo devus esti pli-malpli sama kiel tiu de la membraro ĝenerale. La revuo tamen falis duoble pli rapide. Tio ne

⁴⁶ Pri la malkresko de la TEJO-membraro vd. <http://www.liberafolio.org/2010/tejo-duonigis-en-12-jaroj>. Intertempe TEJO decidis ankaŭ nuligi sian oficialan gazeton TEJO-tutmonde, vd. <http://www.liberafolio.org/2010/tejo-nuligas-sian-oficialan-gazeton>.

okazis pro la reta versio, kiu ĝis 2009 legeblis rete nur al tiuj, kiuj abonis la paperan version, kaj nur ekde 2010 ankaŭ por MJ-membroj. Parto decidis ne plu pagi kiel MA sed nur kiel MJ, parto ĉesis esti membroj entute, ĉar pri la nura Jarlibro ili ne interesiĝis. Rilate al *Kontakto*: En tiu periodo ĝi falis eĉ pli: 1245 abonantoj en 2001, 735 en 2009, t.e. -510 (40,9%). Tiu falo okazis pro la falo de TEJO-membroj: el 560 al 436, t.e. -124 (22,1%), sed antaŭ ĉio pro la malkresko de ne-membraĵaj abonantoj: el 685 al 299, t.e. -386 (56,3%). Do, eblas konkludi, ke la interesiĝo pri *Kontakto* simple malaperis kaj oni povus diri, ke ĝia eldonado ne plu havas sencon, se ne okazos ia radikala ŝanĝo de ĝia redakta koncepto, sed ĉu eĉ tio povus helpi, oni povas dubi. Ĉar verŝajne aliaj, pli profundaj kriterioj (kiel ĝenerala malintereso pri tia revuo aŭ pri Esperanto entute) ludas rolon.

Tamen la ekzemplo de *Spegulo* montras, ke koncepte/enhave alloge farita revuo povas havi ŝancon renaskiĝi el la cindro de antaŭaj projektoj.

Alvoko por lanĉi ekstrajn agadojn

Gravan alvokon publikigis Osmo Buller, ĝenerala direktoro de UEA, la 5an de aprilo 2010 en la retlisto de la komitato de UEA.⁴⁷ Li atentigis inter alie, ke fine de marto estis 4463 membroj, t.e. 232 malpli ol fine de marto pasintjare. La ĉefa kialo evidente estas, ke pro la malpli granda UK ĉi-jare estas malpli da tiuj, kiuj membriĝas por profiti de malpli alta kongreskotizo. Inter la nunaj membroj 405 ne membris pasintjare. El ili 113 aliĝis al la UK en Havano. Samtempe 1650 pasintjaraj membroj ankoraŭ ne renovigis la membrecon. El ili 546 estis aliĝintaj al UK 2009. La ĝenerala direktoro konkludis, ke urĝe necesas ekstra aktiveco por varbi membrojn, ĉar alie la nombro de individuaj membroj estos ĉi-jare nur 5400-5500. Aparte urĝus donacoj al Fondaĵo Canuto, kiu laŭ la ĝisnuna evoluo eble povos ĉi-jare membriĝi ĉ. 100 esperantistojn malpli ol pasintjare, kio aldone premus malsupren la membronombron. Finfine la 15an de aprilo sole komitatanino Masako Tahira rekte referencis al la alvoko de Osmo Buller kaj kontribuis per longa listo kun seriozaj sugestoj.

Pri la aliĝoj al la kuba UK

Ĝis la 15a de aprilo aliĝis al la 95a Universala Kongreso de Esperanto, okazonta en Havano, Kubo, ekzakte 833 personoj el 59 landoj.⁴⁸ La landoj kun la plimulto de aliĝintoj estas Francio kun 106, Japanio kun 70, Germanio kun 64, Kubo mem kun 120 (la 27a de marto estis nur 14, poste sekvis bloka aliĝo de la ceteraj),⁴⁹ Brazilo kun 59, Italio kun 41. Sekvas Pollando kun 21, Nederlando kun 30, Belgio kun 24, Britio kun 17, Danio kun 15, Kanado kun 17, Kroatio kun 15, Litovio kun 15, Meksiko kun 19,

⁴⁷ Vd. <http://groups.yahoo.com/group/komitato-de-uea/message/5399>.

⁴⁸ La aktualan staton de la aliĝoj vd. sur http://www.uea.org/kongresoj/uk_2010.html.

⁴⁹ Ĉu temas nur pri figurantoj (kiel siatempe en orienta Eŭropo), kiuj elvaporigos post la kolapso de la sistemo en Kubo ?

Bulgario kaj Hispanio kun po 11, Hungario kaj Svislando kun po 10, Koreio kaj Finnlando kun po 9, Rusio kun 8. El Usonio aliĝis nur Humphrey Tonkin (kiu havas ankaŭ britan pasporton) kaj ties edzino Jane Edwards (kiu havas nur usonan pasporton). Usonanoj bezonas specialan permeson de sia registaro por veturi al Kubo (sed ĉar la kubaj limkontrolistoj ne stampas la pasportojn, usonanoj povas kvazaŭ kaŝe viziti Kubon). Kiel konate, ĉirkaŭ 10 procentoj de la aliĝintoj konsistas el honoraj membroj, patronaj komitatanoj,⁵⁰ estraranoj, LKK-anoj, kiujn laŭ malnova tradicio oni aldonas kiel senkotizajn UK-aliĝintojn, sed nur relative malmultaj el tiuj (plej ofte maljunaj) honoraj membroj reale partoprenadas la kongreson, despli ekster Eŭropo. Pro tio ni sugestas rompi kun tiu tradicio kaj publikigi nur listojn kun reale aliĝintaj kongresanoj por ne trompi la statistikon kaj la realecon mem.

Pietrzak kontraŭ Tiŝljar aŭ: Pri la cenzuro kaj la subpremo de la libereco en UEA

Sendube oni povus trakti ankoraŭ multajn aliajn temojn lastatempe aktualajn, ĉar unu okazaĵo estas pli interesa ol la alia. Ekzemple la rigora malpermesa letero de Barbara Pietrzak, ĝenerala sekretario de UEA,⁵¹ al Zlatko Tiŝljar, sekretario de Esperanto-Eŭropa Unio, kiu sendis iun leteron de la estraro de EEU al la Eŭropa Komisiono.⁵² Post kiam Pietrzak admonis lin respekti la neŭtralecon de UEA, Tiŝljar cedis kaj konfesis kun „bedaŭro, ke la mesaĝo de la estraro de EEU al la Eŭropa Komisiono malkongruis kun la principoj de politika neŭtraleco...”.⁵³ En sia respondo Pietrzak kun granda kontenteco akceptis la bedaŭron de Tiŝljar.⁵⁴ Dum ekzemple Renato Corsetti „laŭdis la estraron de UEA, kiu rapidege agis, kaj la estraron de EEU, kiu rapidege faris sian pardonpetan deklaron“,⁵⁵ la sola komitatano kaj UEA-estrarano, kiu kuraĝis skribi ion defendan al la iniciato de Tiŝljar kaj favore al la principo de la libera opiniesprimado, estis José Antonio Vergara, estrarano de UEA pri faka kaj scienca agado.⁵⁶

Dum grandparto de la retlista korespondado inter kelkaj komitatantoj ofte sonas kiel reciproka flatado de malnova koterio, pli malpli la samaj komitatanoj kontrolas la diskutosuverenecon ankaŭ en la koncernaj kunsidoj dum la Universalaj Kongresoj per apenaŭ plu eltenebla subjektiveco kaj aroganteco.

En intervjuo kun *Libera Folio* en aprilo 2010, komitatano Tomasz Chmielik, prezidanto de ILEI-Pollando kaj ĉefredaktoro de *Spiegulo*, karakterizis la etoson dum tiuj komitatkunsidoj, kiujn li kiel atestanto mem partoprenis, jene: „La Komitato en la nuna konsisto kaj agadpovo preskaŭ nenion faras por la aktiva influo de la asocio, jam delonge. Ĝi kunvenas dufoje nur dum la UKoj, kaj la ĉefa

⁵⁰ La liston de la honoraj membroj k.a. de UEA vd. <http://www.uea.org/kiu/honoro.html>.

⁵¹ Vd. <http://groups.yahoo.com/group/komitato-de-uea/message/5243>.

⁵² Vd. <http://www.gazetejo.org/system/files/gazetoj/EB-90-01-2010.pdf>.

⁵³ Vd. <http://groups.yahoo.com/group/komitato-de-uea/message/5248>.

⁵⁴ Vd. <http://groups.yahoo.com/group/komitato-de-uea/message/5260>.

⁵⁵ Vd. <http://groups.yahoo.com/group/komitato-de-uea/message/5250>.

⁵⁶ Vd. <http://groups.yahoo.com/group/komitato-de-uea/message/5253>.

punkto en la tagordo estas akcepto de la jara raporto de la Estraro, kiu aperas en la julia-aŭgusta numero de Esperanto. Ĉiujn provojn diskuti en forumo oni estingas tuj pro tempo-manko, kaj des pli volonte, se ili koncernas respondecojn de iu estrarano, kiu multe ŝvitis ‚produktante‘ sian raporto-parton. Veraj diskutoj devus okazi en la subkomitataj kunsidoj, sed denove la tempo-manko ĉesigas disputan fervoron en plej malĝusta momento, ĉar antaŭ la pordo jam forkantas vin internacia koruso aŭ emocie frapfrapas la pordon terure senpacientiĝintaj membroj de la Internacia Ligo de Papilio-Ĉasantoj, kiuj trioje(!) havos sian jaran kunvenon. En tiaj kondiĉoj okazas plej ofte ĉi tiuj kunsidoj, kiuj devus atentigi estraranojn kaj komitatanojn pri la problemoj, kiuj rodas la verdan popolon. Por multaj simplaj kongresanoj estas ankaŭ la unika ŝanco renkontiĝi kun estraranoj kaj komitatanoj. Mi memoras, ke en Bjalistoko mi gvidis la kunsidon de la subkomitato pri faka agado. Kaj estis tre bona kunveno kun multe da fervoraj diskutantoj kaj amaso da proponoj celantaj elanigi fakan agadon. Sed tio estis sekvo de la kelkjara efika kaj kompetenta agado de José Vergara, kiu en la nuna estraro respondecas pri faka agado.⁵⁷

Eĉ Michela Lipari plendis, ke „efektive en la lasta periodo la komitato ricevis tre malmultajn kaj ne regulajn informojn pri la diskutoj, agadoj decidoj ene de la estraro.“⁵⁸ Tio reage al la plendo de Johan Derks, kiu skribis samtage al Lipari: „Kial la Estraro lasas la komitatanojn dum tri monatoj sen scio pri via interna interkonsiliĝo, dum rekte mi ricevis sciigon de la prezidanto ke li simpatias kun la ideo konsistigi komisionon por studi mian proponon ? Kiel vi procedas por ‚fari konkludon‘ ? Ĉu vi ne pensas ke ĝi bezonas unue profundan pristudadon kaj de engaĝitaj komitatanoj kaj poste de ekspertoj (notario, kaj/au alia juristo) ?“⁵⁹ Temas pri la publikigo de la propono pri adaptado de la Komitata Regularo.

Ke do la ĝenerala direktoro de UEA devis lastatempe publike admoni, „ke la Komitato prenu serioze sian taskon kaj plenumu la rolon, kiun la Statuto difinas por ĝi“, estis neevitebla kaj pruvas tre klare, ke la komitato evidente tro malmulte prenas serioze sian taskon aŭ plenumas la rolon difinitan por ĝi de la Statuto.⁶⁰ Interese en tiu ĉi kunteksto cetere estas, ke nek Pietrzak, nek iu ajn UEA-estrarano aŭ komitatano protestis, kiam en 2007 Kuba Esperanto-Asocio laŭ plej kruda maniero malrespektis la neŭtralecon, kiam la ŝtata kuba novaĵagentejo ACN lunde la 29-an de januaro diverslingve dissendis informon, laŭ kiu la komitato de Kuba Esperanto-Asocio kondamnis la politikon de Usono.⁶¹

⁵⁷ Vd. <http://www.liberafolio.org/2010/nftomasz-chmielik-volas-radikale-rompi-la-stagnadon>.

⁵⁸ Vd. <http://groups.yahoo.com/group/komitato-de-uea/message/5412>.

⁵⁹ Vd. <http://groups.yahoo.com/group/komitato-de-uea/message/5411>.

⁶⁰ Vd. <http://groups.yahoo.com/group/komitato-de-uea/message/5433>.

⁶¹ Vd. [http://www.liberafolio.org/2007/kubakondamno/?searchterm=Kuba Esperanto-Asocio kondamnas Usonon](http://www.liberafolio.org/2007/kubakondamno/?searchterm=Kuba%20Esperanto-Asocio%20kondamnas%20Usonon). De ni demandita, ĉu la Centra Oficejo UEA siatempe ne faris publikan proteston, Osmo Buller atentigis, ke UEA postkulise admonis Kuban Esperanto-Asociacion kaj ke li mem parolis pri la afero al la kubanoj dum UK 2007 kaj ankaŭ dum sia vizito al Havano en februaro 2008, kiam li memorigis la kubanojn, kio ĉirilate eblas kaj kio ne. Buller krome menciis en siaj klarigoj, ke en UEA oni tamen kutimas toleri aferojn, kiuj estas oportunismaj aplikoj de iaj liturgiaj praktikoj en la koncernaj landoj, kondiĉe ke tio restas en iaj akcepteblaj limoj.

La obstina batalo de Gbeglo Koffi kaj la iluminiĝaj klopodoj de Probal Dasgupta

La UEA-komitato diskutis ankaŭ temojn kiel la riproĉajn intervenojn de Koffi Gbeglo, ĉu oni publikigu la plenan jarraporton en la revuo *Esperanto* aŭ ne kaj ĉu oni kunigu la UEA- kaj SAT-kongresojn. Kiel kutime tuj sekvis forta kontraŭstarado el la konservativa tendaro. Jam dum monatoj kaj jaroj Gbeglo Koffi obstine serĉadas apogon inter esperantistoj por pruvi, ke UEA malpravas rilate la afrikajn aferojn. Ankaŭ liajn intervenojn la komitatoj ne ŝatas,⁶² sed samtempe evidente mankas al ili taŭga strategio por helpi solvi la afrikajn demandojn. Nu bone, UEA solvis ilin translokante la Afrikan Oficejon de Lomeo al Benino. (Al afrikaj temoj *Spegulo* okaze revenos). Ioman miradon kaŭzis ankaŭ diversaj eldiroj de prezidanto Dasgupta, kiujn li publikigis diversloke. En iu ‚epistolo‘, publikigita en la komitata retlisto la 2an de marto, li konfirmis, ke li ‚fidas al la kapablo de la homeopatio kaj de iuj naturkuracoj efektive doti la homojn per pensano‘, kaj li ‚trovas la alopatian sistemon venena.‘ Laŭ Claude Piron, kiu diagnozis la mondan lingvan malordon kiel malsanon, Dasgupta samtempe konfesas, ke en sia ‚vizio Esperanto estas la sola ‚bona lingvo‘, la sola rimedo por la lingva pensano por multlingva planedo.‘ Samtempe li ‚kredas, ke la monda publiko pli kaj pli klare vidas la kontraŭhigienajn, venenajn efikojn de la surtroneco de la angla‘ lingvo. Eĉ rekomendon por konkreta psikoterapio Dasgupta prezentis: ‚Dume, unu el niaj gravaj taskoj estas kultivi ĉe ĉiuj, komencante ĉe ni mem, la ideon kaj la kutimojn de la homa pensano. Por ke tiu ideo atingu finan venkon, ni devas forkreski de la kutimo deziri finajn venkojn por tiu aŭ alia lingvo, tiu aŭ alia modo, tiu aŭ alia specifa institucio, eĉ por tiu aŭ alia konkreta formo de la demokratio.‘⁶³ Diablo scias, kiun komprenon Dasgupta havas pri demokratio – sed kiun tio interesas ? En intervjuo publikigita en la blogo de Maria Sandelin, Dasgupta plendis, ho ve, ke ekde 1967, jaro de lia esperantistiĝo, neniu esperantisto pretas aŭskulti liajn argumentojn. Pri si mem li emfazas, ke li ja ‚estas serioza pensulo‘, sed ke lia ‚pacienco havas limon‘.⁶⁴ Kion tio signifas, aŭ signifu ? - ĉu la demision kiel prezidanto de UEA ? La plenan movadan fiaskon de la protagonisto el Hindio, pardonu: Barato, eblas ilustri ja ankaŭ laŭ ciferoj, nome laŭ la kvanto kaj kvalito de membroj, kiujn UEA havas en Hinda Unio, kie loĝas 1.166.079.217 homoj: Tie UEA havas nur 22 individuajn kaj 100 aligitajn, sume 122 membrojn kaj nur 8 delegitojn. Tio estas tiom malaltegaj ciferoj, tiel ke apenaŭ indas noti ilin en la statistiko. Do, tiuj hindiaj, pardonu: barataj ciferoj klare diras ankaŭ, ke la grandiozaj vizioj de Probal Dasgupta esperantigi la mondon, aŭ almenaŭ ĝian hindian parton, ne plenumiĝis kaj ke ankaŭ lia epoko kiel UEA-prezidanto definitive kaj nerevenigeble finiĝis, eĉ se li aldonus duan trijaran mandaton, kion li prefere ne faru.

⁶² Vd. <http://www.esperantio.net/index.php?id=1255>.

⁶³ Vd. <http://groups.yahoo.com/group/komitato-de-uea/message/5280>

⁶⁴ Vd. <http://mariasandelin.wordpress.com/2010/03/23/probal-dasgupta-vane-atendas-diskutpartneron>

Furorlisto por ‚Dummies‘

Alia ŝoka sperto en Esperantujo estas la rigardo sur la furorliston de la UEA-libroservo pri venditaj libroj en 2009. Ĉi tiu listo pruvas, unu plian fojon, la katastrofe malaltan legokulturon de la esperantistaro. Anstataŭ monde gravaj kaj altnivelaj libroj (nu en Esperanto ili apenaŭ ekzistas), la esperantistoj preferas aĉeti unuavice banalajn bagatelaĵojn kiel la *Poŝamikon* de Beatrice Allee kaj Katalin Kováts (Den Haag 2a eld. 2007, 40 p., prezo € 5.10) kun 392 vendoj. Sekvas *Ĉu vi parolas tendare ?* de Renato Corsetti kaj Mauro La Torre (TEJO Roterdamo 4a eld. 1992, € 4.80) kun 213 vendoj, *Vojaĝo en Esperanto-lando* de Boris Kolker (UEA Rotterdam, 3a eld. 2005, 280 p., € 18.00, 179 vendoj), *Esperanto de nivelo al nivelo* de Zs. Kóródy, P. Salomonné Csíszár, L. Szabó kaj M. Kovács, (Budapest 2008, 136 p., € 10.50, 167 vendoj), *Pocket Esperanto Dictionary* de Andrew McLinen (UEA Rotterdam 2a eld. 2001, € 15.00, 121 vendoj), *Monumente pri Esperanto* de Hugo Röllinger (UEA Rotterdam 1997, 111 paĝoj, € 7.50, 112 vendoj), *Utila Estas Aliĝo* de Ulrich Lins (UEA Rotterdam 2008, 126 p., € 15.00, 106 vendoj, *Vivo de Zamenhof* de Edmond Privat (UEA Rotterdam 6a eld. 2007, 171 p., € 9.00, 100 vendoj), *Internaciaj Ekzamenoj de ILEI/UEA* (UEA/ILEI Rotterdam 3a eld. 2008, 38 paĝoj, € 4.50, 91 vendoj), *Konciza klarigo pri la landnomoj en Esperanto* de Anna Löwenstein (Palestrina 2009, 12 p., € 0.90, 88 vendoj). Por mencii la unuajn dek plej furorajn titolojn.

La ĝeneralaj konkludoj estas embarasaj: Ŝajnas, ke la esperantistoj aĉetas ĉefe librojn, kiuj estas malmultekostaj, ne tro ampleksaj, enhave kaj nivele iom banalaj, ĉefe movadaj/lingvaj/lingvolernaj, kiuj devenas de iom popularaj aŭtoroj (kiuj tamen lastatempe malmulton esencan kontribuis al la Esperanto-literaturo) kaj kiuj estas eldonitaj de UEA en Roterdamo – do la asocio faris efikan varbadon por siaj propraj eldonaĵoj. Eĉ unu beletra verko ne estas reprezentita inter la dek unuaj titoloj, kaj ankaŭ inter la sekvaj listigitaj titoloj oni beletron vane serĉas. Kiel konkludi kaj komenti ĉiujn tiujn ‚fenomenojn‘ por kunigi ilin sur komunan denominatoron ? La unua penso, kiu venas al nia menso estas: elŝanĝo de la funkciuloj (sed kiuj estu la alternativaj ?). La dua penso: ŝanĝo de la strukturo(j) kaj strategio(j) de la Esperanto-movado. La tria penso koncernas la resuman ideon, ke oni liberiĝu de malnova movada balasto, kaj ideologie, kaj strukture, kaj personare. Resume: Necesas freŝa vento, inovacioj, eble novaj argumentoj, certe novaj publikoj kaj pli da novaj libroeldonoj. Sen plenumi la menciitajn kondiĉojn ĉio neeviteble stagnos sur malalta nivelo kaj eĉ riskos ŝrumpi kaj pere. Oni vidas, ke en ĉiu editorialo de nia revuo ni venas ĉiam al la samaj konkludoj, eĉ se la traktitaj temoj kaj premisoj estas de tempo al tempo iom aliaj.

Post la kuba kongreso ni revenos al diversaj temoj kiel: nova estraro de UEA, novaj B-komitatanaj de UEA, nova strategia plano de UEA, estrara raporto, k.a.

(Aperis en *Spiegulo*, 2/2010)

Esperanto inter brikaj kaj kanajlaj ŝtatoj

La Esperanto-movado, kaj precipe ĝia ĉefa reprezentanto, Universala Esperanto-Asocio pli kaj pli panikas, ĉar neniu internacia organizo kaj neniu unuopa ŝtato interesiĝas pri Esperanto, por enkonduki ĝin en la lernejojn. En Eŭropo la pozicio de Esperanto estas evidente malfacila, precipe en orienta Eŭropo, kie la falo de la komunismo signifas samtempe la falon de Esperanto. Kelkaj displititaj privataj Esperanto-strukturoj ankoraŭ klopodas savi tie kio estas savinda, aŭ savebla, fakte sen granda daŭra efiko. Multaj iamaj funkciuloj ankoraŭ ne komprenis, ke la malnovaj tempoj pasis kaj tiel kondukas. Kritiko estas rifuzita. Oni preferas fuŝi ol ŝanĝi ion en la strategio, enhavo aŭ pensmaniero. Kaj en Eŭropa Unio oni adoras la dogmon de la multlingvismo, kvankam en la ĉiutaga laboro ĉefe la angla dominas kiel komuna lingvo de oficistoj kaj politikistoj. Tio estas la evoluo kaj ĝi estas nehaltigebla. Multaj observantoj kaj komentantoj konsideras la eŭropan multlingvismon hipokrita nepraktikeblo. Pro tio, la kleriga sistemo relativigas la multlingvismon al du-tri lernendaj lingvoj, krom sia gepatra tio estu unu-du de la grandaj eŭropaj lingvoj, nu ĉefe angla, apenaŭ plu franca, germana aŭ hispana, aŭ rusa. Por komuniki kun komercemaj azianoj estas rekomendate, kvankam neoficiale, lerni la ĉinan, japanan, korean, vjetnaman, tajlandan, indonezian. Sed pli kaj pli ankaŭ ĉinoj, japanoj, koreoj, vjetnamoj, tajoj kaj indonezianoj aplikas la anglan, se ili ne aplikas ĝin jam delonge, kiel duan nacian lingvon.

Tio okazas en Eŭropo. Sed lige kun iuj lastatempaj elpaŝoj de la prezidanto de UEA ni rigardu nun ekstereŭropon.

Nova landogrupa konstelacio

Okaze de la unua pintkonferenco de la tiel nomataj BRIC-ŝtatoj – Brazilo, Ruslando, Hindio kaj Ĉinio, okazinta la 16an de junio 2008 en Jekaterinburgo, Ruslando, laŭ invito de la ruslanda prezidento Dmitrij Medvedev aperis en tiu urala urbo la ŝtatestroj Luiz Ignacio Lula da Silva, Manmohan Singh kaj Hu Jintao. Samloke okazis kelkajn tagojn antaŭe la 9a pintkonferenco de la t.n. Ŝanhaja Koopera Organizo (SCO), al kiu apartenas krom Ruslando, Ĉinio ankaŭ Kazahio, Kirgizio, Uzbekio kaj Taĝikio, dum Hindio, Pakistano, Irano kaj Mongolio havas la statuson de observantoj. Bela kolekto de neokcidentaj ŝtatoj, kiuj vekas hororon en Okcidento nur pro la mencio de iliaj nomoj. La atento de okcidentaj gazetaroj pri tiuj pintkonferencoj estis modesta, kaj la gravecon de la diskutoj oni, malprave, bagateligis. Tiel opinias Alexander Rahr de la Germana Societo pri Ekstera Politiko, kiu kredas, ke unu tagon la Okcidento vekiĝos kaj konstatos, ke ĝi tradormis historian evoluon. La landaro de la ŝanhaja grupo kunigas 1,5 miliardojn da homoj kaj kovras la duonon de Eŭrazio. La potencialo de la BRIC-landoj (brikaj landoj) ampleksas 2,8 miliardojn de loĝantoj aŭ 40 procentojn de la monda loĝantaro sur tri kontinentoj, La geopolitika superpezo de la brikaj ŝtatoj estas nekontesteble granda kaj ilia parto de la ekonomio ampleksas 25 procentojn, kun enorma kresko, malgraŭ la ajtualata tutmonda financa kaj ekonomia krizo – en kiu eĉ

Esperanto Studies Foundation, la ĉefa sponsoro de la Esperanto-movado, evidente perdis la trionon de sia kapitalo.⁶⁵

La Okcidento estas skeptika

Por la okcidenta pensmaniero tiu nova landa konstelacio, en kiu Usono, Eŭropa Unio kaj Japanio tute ne estas reprezentataj, signifas provokon. Malgraŭ certagrada impresiĝemo kaj timo en Okcidento, iuj analizistoj restos sobraj: SCO kaj BRIC devus unue pruvi, ke ilia progreso konfirmiĝos, krom tio oni imputas al tiuj landoj neoimperiismajn revojn kaj grandpotencan politikon ĉe samtempa rifuzo transpreni respondecon en la mondo (pri ekologio, homaj rajtoj, ktp.). Plej verŝajne tiu riproĉo estas pravigebla, kaj la agado de SCO kaj BRIC dume eble nur blufa. Malgraŭ tiu ŝajno, la Okcidento estas maltrankviligita. Oni demandas sin kaj miras kial tio eblas, ke la ‚aliaj‘ kuniĝas sen peti la Okcidenton aliĝi. Fundamentaj tradiciaj konvinkoj en Okcidento estas subite pridubataj. Kaj kiel reago oni verŝajne diras: Kio ne rajtas esti, tio ne povas esti. Por solvi la problemon kun tiu nova konstelacio, oni simple atentigos pri la problemoj de tiu landogrupa, aldonos ankoraŭ unu liston de problemoj, akcentas la diferencojn kaj diversajn interesojn, kaj la mondo estas denove en ordo.

Sekvoj de la financa krizo

La financa krizo de aŭtuno 2008 certe skuis tiun okcidentan percepton de la mondo, kiu ĝis tiam validis memkompreneble, ĝis iu grado eĉ por la nova landogrupa mem. Sed tiam ĝi ricevis la decidan ŝokon, eĉ se multaj okcidentaj financistoj tion ankoraŭ ne komprenis, ne kapablis kompreni. La valida sistemo bankrotis, kaj la kulpon oni donis unuavice al Usono, la ĉefa ekonomia potenco de la mondo. Kiel refleksa konsolo oni diris, ke ĉiukaze la tuta mondo sidas en unu boato, do kun nia ankaŭ SCO kaj BRIC. Sed la landoj de SCO kaj BRIC, eĉ se inter ili troviĝas kelkaj ŝtatoj, kiuj estas de Usono viditaj kiel kanajlaj, pensis alimaniere. Ili jam eltiris siajn konkludojn el la azia krizo de 1997, rezignante pri kelkaj financpraktikoj de la angla mondo, favore al la kreskego de la propraj popolekonomioj. Ĉinoj permesis al si novan arogantecon, kondamnis la okcidentajn bankistojn kiel senrespondecaj kaj propagandis siajn proprajn receptojn, kiujn la mondo akceptis. Nu, la resto estas altnivela ekonomioscienco, kiun ni ne detalumu ĉi tie. En la unua jarduono la ĉina ekonomio kreskis je 6 procentoj (malgraŭ la 25-procenta redukto en la eksporto); ankaŭ la india ekonomio kreskas je 4 procentoj, sed la ekonomia kresko de Brazilo estis en 2009 verŝajne nula, sed en 2010 ĝi eble rekreskos. Ruslando travivis gravan ŝokon pro la falo de la prezo de la energio kaj krudmaterialoj. Kompare kun ĉio tio, la ekonomioj de Usono, Eŭropo kaj Japanio ŝrumpegas. Ŝajnas, ke la brikaj landoj celas displektiĝon de la krizo en Usono kaj Eŭropo, do de la G8-landaro, kiu, por savi ĝin, devis esti vastigita al la G20-landaro, kiu ampleksas ankaŭ la brikajn landojn. La strategiaj planoj de la brikaj landoj pri nova ordigo de la internacia financa sistemo estas konata. Precipe Ĉinio

⁶⁵ <http://www.liberafolio.org/2009/la-monda-krizo-voras-esperantajn-projektojn>

kaj Ruslando bruegas pri ĝi, dum Brazilo kaj Hindio kondutas pli reteneme en ĉi tiu demando. Inter la punktoj de tiu plano troviĝas la strikta regulado kaj kontrolado de la financaj merkatoj kaj la rezigno pri la usona dolaro kaj la kreo de nova monda rezerva valuto, kiu baziĝas sur krudmateriala varkorbo kaj valuta korbo kaj sur reformo de la Internacia Monfonduso. Sed oni ne nur planas, sed jam konkrete agas: Ekzemple Ĉinio fariĝis la plej grava komerca partnero de Hindio kaj Brazilo, ankaŭ de certaj afrikaj landoj, kaj pli kaj pli da komercaj kaj financaj transakcioj ne plu okazas pere de la usona dolaro.

Reagoj en UEA

Ŝajnas, ke ĉi tiu tuta evoluo havas ankaŭ sekvojn por Universala Esperanto-Asocio (UEA) kaj la Esperanto-movado entute. Post la jekaterinburga konferenco, prof. Probal Dasgupta, prezidanto de UEA kaj mem reprezentanto de unu el tiuj briklandoj, sentis la bezonon sendi leteron al la kvar ĉefaj partoprenantoj de tiu evento, taksante ĝin kiel historian. Li skribis: Ekonomia krizo okazigita alilande trafas viajn landojn grave, ne nur pro la nekredeblaj riskoj kaj ŝuldoj alprenitaj en Usono, sed ankaŭ pro la fakto, ke la valuto de nur unu lando rolas kiel internacia valuto. Samtempe li formulis jenan proponon: Universala Esperanto-Asocio proponas al vi la ideon, ke valutoj kaj lingvoj funkcias sammaniere. La internacia uzo de la angla plifortigas nur kelkajn privilegiitajn landojn kaj samtempe starigas riskojn kaj kostojn por ĉiuj aliaj. Ĉu tiaj privilegioj, valutaj kaj lingvaj, kondukis nin al pli bona mondo? Ĉu la kostoj estis efikaj? Certe ne.

Fine Dasgupta, kiu evidente ne konsciis, sur kiun tiklan politikan-ekonomian terenon, kiu la Esperanto-movadon neniel povas koncerni, li enpaŝis, flatis la kvar landojn per jenaj frazoj: Viaj kvar landoj estas promesaj landoj por la estonteco. Sed vi, kiel ni tra la tuta mondo, devas ĉesigi la valutajn kaj lingvajn privilegiojn, se ni volas progresi rapide, malpli koste kaj harmonie. Pri nova valuta sistemo, vi jam havas ideojn kaj proponojn. Por nova lingva sistemo, ni proponas Esperanton kiel efikan, pragmatan kaj malpli koston solvon.

Do, oni ne komprenas, kial Dasgupta nome de UEA enmiksiĝas en demandojn pri valutaj privilegioj kaj interligas ilin kun lingvaj privilegioj. Ekonomiaj privilegioj eble iel estas ligitaj kun lingvoj, sed valutaj problemoj havas, laŭ ni, nenion komunan kun lingvaj rajtoj kaj do ne devus esti intermiksitaj.

Kiel respondon al la letero de Dasgupta estas ĝis nun konata sole la letero de la brazila prezidento, de reprezentanto de lando, kiu tradicie ŝajnas esti iom favora al Esperanto. Ni ne intencas komenti aŭ interpreti tiun ĉi respondon sur la paĝoj de nia revuo, sed nur atentigas je sekva kontraŭdiro: Unuflanke la brazilanoj deziregas ke, fakte, iun tagon Esperanto povu esti akceptita de plejparto de la nacioj kiel lingvo adoptita por faciligi la komunikadon sen lingvaj privilegioj. Aliflanke oni ŝovas la respondecon al Unuiĝintaj Nacioj por laŭgrade pligravigi la rolon de Esperanto kiel internacia lingvo kaj sekve ni ne vidas necesa pridiskuti la aferon, ĉar ni konsentas pri la valoro de la lingvo disvastigata de via asocio. La letero portis la subskribon de iu

Cláudio Soares Rocha, direktoro pri Historia Dokumentado. Poste oni estis informita pri tio, ke en kunsido de la 16a de septembro 2009, la komisiono pri Edukado de la brazila Senato aprobis la leĝoprojekton, kiu permesos/instigis la instruadon de Esperanto en mezlernejoj, laŭ la ekzisto de deziranta lerneja komunumo. En tiu noto, oni reliefigas la favoran voĉdonon de la raportinta senatano, laŭ kiu Esperanto „povas signifi instigon al paco inter la landoj“. La noto ankaŭ indikas, ke kontraŭ ĝi voĉdonis senatanoj Gerson Camata (el la ŝtato Espirito Santo, kies guberniestro li iam estis), kaj Roberto Cavalcanti (el la ŝtato Paraíba, entreprenisto). Laŭ Camata, temas pri „senutila projekto“, ĉar tiu, kiu lernos Esperanton, ne havos aliajn parolantojn por kunpraktiki la novan lingvon.⁶⁶ Do, oni daŭre atendas la ĉi-rilatan respondon el Ruslando⁶⁷, Hindio kaj Ĉinio.

Finfine: Homaj Rajtoj

Ĝis nun ni multe skribis pri brika kaj ŝanhajgrupa landaro, pri la monda ekonomia krizo kaj la letero de Dasgupta al la estroj de la brikaj ŝtatoj kaj la reago el Brazilo. Post tiu longa enkonduko ni alvenas al la ĉefa parto de la konsideroj – la homaj rajtoj. Ni ne devas longe mediti pri tiu temo, pri kiu informojn oni trovas ĉe Amnestio Internacia, Transparencio Internacio kaj Societo pri minacataj popoloj. Ni ne devas aparte emfazi, ke multaj membroj de la SCO- kaj BRIC-grupo daŭre ne solvis siajn problemojn pri homaj rajtoj, la korupcio kaj la respekto de la minoritatoj. Pro tio ni restas, milde dirite, skeptikaj, ke UEA pere de sia prezidanto ‚amindumas‘ kun tiuj ŝtatoj, al kiuj aldoniĝas Irano, Mongolio, Angolo kaj Kubo, kiuj el la vidpunkto de homaj rajtoj apartenas al la plej dubindaj ŝtatoj de la mondo. Pri Irano, kie la islama reĝimo draste subpremadas la homajn rajtojn, ni esperu, ke la iam ‚glora‘ Esperantomovado revigliĝos, de la mongolaj esperantistoj, kiuj ĵus sukcesis aligi sian Landan Asocion al UEA, oni atendas, ke ili admonu sian registaron pri la respekto de la homaj rajtoj, same Kubo, kie en 2010 okazos la 95a Universala Kongreso, kaj Angolo, kie la aliĝo de la landa asocio estas preparata.

⁶⁶ <http://www.senado.gov.br/agencia/verNoticia.aspx?codNoticia=95294&codAplicativo=2>

⁶⁷ Fakte en Ruslando, la Prezidenta Konsilio pri Sekureco de la Ruslanda Federacio, reprezentita de iu I. Beljaev, respondis, en septembro 2009, al letero de Rusia Esperantista Unio, direktita al Kremlo en majo 2009, en kiu la rusaj esperantistoj (Gudskov/Seguru) inter alie asertis, ke la angla lingvo fariĝas minaco kontraŭ la kultura identeco kaj, sekve, por la nacia sekureco de la neanglalingvaj landoj, inkluzive de Ruslando. Beljaev inter alie donis treege interesan respondon, argumentante, ke la rezigno pri la nacia lingvo en internaciaj rilatoj favore al artefarita planlingvo povus esti interpretata kiel libervola rezigno pri unu el la karakteriziloj de la nacia suvereneco. Do, rekte-nerekte Kremlo rifuzis la pretendojn de REU, kiu per siaj stultaj atakoj kontraŭ la angla lingvo kaj kontraŭ la elstara rusa lingvistino, prof. I.I. Ĥaleeva, rektorino de la Moskva Ŝtata Lingvistika Universitato (MGLU), kiun oni kritikis pro lobiado favore al la angla lingvo, grandparte detruis siajn proprajn celojn de lobiado por Esperanto. Malgraŭ tio, Beljaev ne ekskludis la eblecon, ke Esperanto povus esti fakultative instruata en mezaj kaj altaj lernejoj. Vd. http://www.liberafolio.org/2009/medvedev-diras-201dne201d-al-esperanto/talkback/1254300484/discussion_reply_form

For la manon de kanajlaj ŝtatoj !

Resume: Malgraŭ la enorma potencialo, kiun tiuj ŝtatogrupoj havas, oni ne kredu, ke ili favorus Esperanton, krom eble por la fakultativa instruado kaj por la ŝtata propagando, kiun ili praktikas en diversaj fremdlingvoj. Esperanto estas esence liberalisma kaj humanisma projekto, kiu ne konvenos al ŝtatoj, kiuj aŭ subpremas la liberecon, malrespektas grandstile la homajn rajtojn kaj persekutas la civilan socion kiel tion sisteme praktikadas Ruslando, Ĉinio, Kazaĥio, Kirgizio, Uzbekio kaj Taĝikio, Irano, Mongolio kaj Kubo, k.a., aŭ kiuj estas tiom ekstreme malriĉaj kiel krom la ĵus menciitaj landoj ankaŭ Brazilo, Hindio, Angolo, k.s. Objektivaj kondiĉoj por la enkonduko de Esperanto kiel „demokrateca lingvo“ en tiuj landaroj do mankas, eĉ se en iuj el ili oni konsideras ĝian fakultativan instruadon, kvankam la motivoj por tia decido ne estas klaraj.

Ni konsciu samtempe, ke supozeble neniu lando de la mondo estas anĝelo rilate la homajn rilatojn, inkluzive de la plimultaj eŭropaj, kiuj insistas, ke aziaj, afrikaj kaj sudamerikaj landoj respektu la homajn rilatojn. Amnestio Internacia riproĉas eĉ al Danlando, kie en 2011 okazos la Universala Kongreso de Esperanto, malrespektadon de la homaj rajtoj lige kun la severigo de la leĝoj pri fuĝintoj kaj ekzilpetantoj. Montrofingrante al „kanajlaj“ ŝtatoj, ni ne prisilentas ankaŭ la problemojn en aliaj landoj. Tamen, ekzistas granda diferenco inter la malrespekto de homaj rajtoj en Ruslando, Ĉinio, Mongolio, Kubo k.s. landoj unuflanke kaj Danlando, Pollando, Svislando, Estonio k.a. aliflanke.

Pro la senceco de la ideo konsideri por Esperanto en la ĉi tie pridiskutitaj landaroj, kiuj havas komplete aliajn taskojn solvendajn ol enkonduki Esperanton en siajn lernejojn, ni sugestas al UEA reveni al la racio kaj mediti pri tio, kiuj landoj vere povus esti perspektivaj kiel favorantaj de Esperanto. Ne estu landoj, kiuj supozeble misuzas Esperanton por propagandaj kaj turismaj (valutaj) celoj, sed estu landoj, kiuj konsideras Esperanton sur la bazo de sincera interesiĝo pri promocio de la internacia neŭtrala planlingvo laŭ la intencoj de Zamenhof, Hodler, Privat, Lapenna, k.a. La revo pri grandskala enkonduko de Esperanto estas vana, necesus plani malgrandajn projektojn, en kiuj Esperanto povus ludi iun rolon, seeble ne nur efemeran.

Por illustri la disskutojn, kiuj en la pasinteco okazis sine de UEA, ankaŭ rilate la perspektivojn de la lingvo Esperanto, ni aperigas la unuan parton de historia skizo de UEA, kiu estis verkita laŭ la publikigitaj kontribuoj de la revuo Esperanto.

(Aperis en *Spegulo*, 1/2010)

Ĉu nova Esperanto-movado? Kial, kiam?

Kvankam pasis unu jaro, tiuj rememoroj estas daŭre freŝaj kaj lasu nin reveni al tio. Dum kiam la 93a Universala Kongreso en Roterdamo estis okazanta, la romia papo ankoraŭ vojaĝis en Aŭstralio, kie lin vidis kaj aŭdis centmiloj da homoj, en Francio ruliĝis, sekvata de milionoj da spektantoj, la ĉiujara bicikla ĉefevento *Tour de France* kun siaj kutimaj dop-skandaloj, en Beogrado estis arestita Radovan *Karadžić*, ĉefsensacio, pri kiu miregis milionoj, se ne miliardoj, en Berlino paroladis Barack Obama antaŭ 200 000 homoj por varbi je Usono kaj sia prezidontiĝo; poste sekvis grava diplomata krizo kun Libio pro iu skandalfilo de Kaddafi, pri kiu nenie en Eŭropo oni restis indiferenta. En orienta Svislando amasiĝis 25 000 skoltoj. Carla Bruni konfesis, ke ŝi ne havis 30, sed nur 15 amatojn aŭ amantojn. La patrino de Britney Spears bedaŭris, ke ŝi akcidente mortigis infanon antaŭ 30 jaroj, kaj Sarah Jessica Parker el *Sex and the City* forigis sian denaskan nevuson. Kompreneble ankaŭ tiujn novaĵojn eksciis milionoj da gazetlegantoj. Jen la plej gravaj sloganoj de la somero 2008, kaj la listo certe ne estas kompleta.

Samtempe en Roterdamo kongresis 1800 esperantistoj. Sed pri tio evidente neniu aŭ malmultaj de la „ekstera publiko” sciis, kiel Dennis Keefe eltrovis en sia enketo (li jam faris ĝin en Florenco kaj Jokohamo, kun la sama rezulto), kiu estis publikigita en *Libera Folio*. En *Google News* ni ne kapablis trovi samtempe iun ajn gazetarajn artikolojn pri Esperanto. Do, oni ne scias, ĉu gazetaraj komunikoj al nacilingvaj servoj estis senditaj. Oni povis legi, ke iuj artikoloj pri la kongreso aperis en la nederlanda gazetararo.

Por tiuj, kiuj restis hejme, la solajn freŝajn novaĵojn pri la UK dum la kongresa semajno disponigis la retujo *Libera Folio* kaj la kongresa kuriero *Jubileanto*, de kiu 6 eldonoj estis publikigitaj en la reto. Post la kongreso sekvis iuj gazetaraj komunikoj de UEA interalie kun sciigo pri aljuĝitaj premioj kaj diversaj prikongresaj registraĵoj sur *Ipernity* (Kalle Kniiivila) kaj *YouTube*. Kaj la subjektivaj raportoj de iuj kongresintoj iel parte povis kompletigi la bildon. La oficiala publika raporto aperis, kiel kutime, en la septembra numero de la revuo *Esperanto* (UEA). Ĝin ni ĉi tie ne komentas.

En la fokuso de *Libera Folio* estis la programero „la estraro respondas”, kiun partoprenis ne pli ol 100 personoj, ke Corsetti fariĝis membro de la komisiono, kiu elektos la venontan estraron. En la kongresa kuriero eblis legi, ke Simo Milojević fariĝis honora membro de UEA (oni miras, kial nur nun) kaj ke la tempo por la kunsido de la Subkomitato pri Landa kaj Regiona Agado estis tro mallonga, tiel ke la Internacia Koruso insistis pri sia vico okupi la salonon. En sia salutmesaĝo Koichiro Matsuura, ĝenerala direktoro de UNESCO, opiniis, ke pro la Jaro de Lingvoj la roterdama UK okazas en la taŭga momento. En sia tradicia salutmesaĝo, kiu estis religie inspirita, Louis-Christophe Zaleski-Zamenhof, la nepo de la Majstro, laŭdis aktivulojn, precipe personajn amikojn, kiuj grave kontribuis al UEA, samtempe atentigante pri la danĝeroj de la lingva diverseco kaj revokante la „sanktan harmonion” de la esperantistoj, kiun sugestis lia propra avo, deklarita kiel la avo de ĉiuj esperantistoj. Cetere oni ne reduktu Universalan Esperanto-Asocion al unuopaj personoj, kiel Tonkin, Corsetti, Nourmont, Pietrzak, Lipari, ktp., malgraŭ iliaj meritoj, ĉar el tio povus estiĝi speco de persona

kulto, kiu estas nedezirinda, despli se necesas prepari novajn aktivulojn por la estonto de UEA. La kongresa rezolucio ripetis pli-malpli la samajn stereotipojn (nu, kial ne?) kun verŝajne troiga karakterizo de Esperanto kiel „lingva trezoro de la homaro. Cetere, kial ni devas funkcii kiel advokato de indiĝenaj popoloj ne estas klare. Iliaj problemoj povus esti eventuale niaj problemoj nur kiam indiĝenaj minoritatoj ekengaĝiĝos ankaŭ favore al la Esperanto-afero. Laŭ ni tro patosaj elementoj en festparoladoj kaj rezolucioj devus iom post iom malaperi el niaj oficialaj dokumentoj, kiuj, se ni ne eraras, direktiĝas parte al la „ekstera mondo“, ĉar ili ĝenas nian kredindecon. La arkaikaj tempoj de L.L. Zamenhof jam delonge pasis, almenaŭ en la evoluintaj landoj. Kaj tiuj, kiuj ŝatus revoki ilin, vane klopodus tion. Do, ni devas kompreni, ke nur por ni mem ni estas signifaj, dum la ceteraj persiste kaj senprecedence ignoras nin kaj ankoraŭ longege ignoras nin (se ni tujtuje ne ŝanĝos nian strategion). Tio ne signifas, ke ni ĉesu revii nian revon pri komuna internacia lingvo, sed tio signifas, ke ni devas alimaniere, pli trafe kaj pli sukcespromese „vendi“ niajn ideojn, ŝanĝante nian strategion. Se oni volas eviti, ke „la mondo“ tute forgesos Esperanton kaj konsideras ĝin Kiel *causa finita*.

Inter la publikaj elpaŝoj, kiuj eble vekis plej grandan atenton, almenaŭ por observantoj, estas la festparolado de Humphrey Tonkin, almenaŭ ĝiaj dua aŭ tria partoj, kaj liaj konsideroj en la 5a eldono de la kongresa kuriero. Analizante ĉi „dokumenton“, ni ŝatus komenti la reston de nin absorbantaj demandoj. En la timo, ke UEA, produkto de 1908, se ĝi daŭre funkcios tradicie kiel kotizkolektanto kaj servovendanto, povus malaperi, ne adaptiĝonte al la novaj cirkonstancoj, Tonkin venis al la konkludo, ke estas bezonata „nova UEA por nova epoko“. Nature, UEA estas konservenda. La ĉefa celo de UEA estus, laŭ la oratoro, kunigi siajn membrojn por disvastigi la lingvon. UEA restas grava kaj centra, ĉar laŭ Tonkin ĝi povus plej bone informi la mondon pri Esperanto, plej bone stimuli agadon ekster la propraj rondoj, plej bone reprezenti la Esperanto-movadon ekstere. Sed se oni volas esti aktiva esperantisto, oni ne plu bezonus aliĝi al organizaĵo, sufiĉus utiligi modernajn ret-komunikilojn, kiel la eminenta ĉefesperantisto klarigis.

La vortojn de Tonkin sekvis aplaŭdo, sed estas malfacile flari la reagojn kaj sentojn de la UEA-anoj. Ĉu tiu afabla konsidero de la alvoko de Tonkin signifas, ke ili supozeble deziras konservi ĉi organizaĵon „finvenkista“, ke ili tute ne deziras ŝanĝojn kaj ŝatas patosajn frazojn. Do, kiel tiu nova UEA inter „finvenkismo, „raŭmismo“ kaj „pragmatismo“ estonte aspektu, kiu reformu ĝin kaj kiam la renovigo estos aranĝita, restis nederite, restas neklare.

Nekontesteble estas, ke malgraŭ diversaj historiaj obstakloj la esperantistaro akiris sian unuecon: „unuecon lingvan – sur kiu fondiĝas ĝia ekzistado – per Esperanto, unuecon idealan per Esperantismo, unuecon organizan per UEA” (Hector Hodler, *Unueco*, en: *Esperanto* n-ro 92/1911). Sekve oni povas konstati kun miro, kiel aktualas nuntempe la vortoj de la fondinto de UEA: „Nia lingva unueco, unue formita, estas la plej certe starigita. (···) Malpli preciza kaj malpli forta estas nia ideala unueco. Ĝis nun ĝi estas pure senta: simpatio, solidareco, pli vere samideaneco, jen el kio konsistas la interno idea de Esperantismo. Sed la esenco de Esperantismo estas ĝia speciala solvo de la intergentaj rilatoj, ĝia aparta kompreno de internacieco. En tiu rilato malmulto estis farita, ĉio restas farota.

Kiom da Esperantistoj daŭras pensi nacie kaj ne povas sin levi super sia nacia juĝo? (···) Ni havas sufiĉe da talentaj instruantoj pri Esperanto, sed kiom da *edukantoj* pri Esperantismo? (···) Ni bezonas (···) homojn, kiuj komprenigus al la Esperantistaro la socian valoron de Esperantismo, kiuj aplikus ĝin al la diversaj problemoj de la internacia vivo, kiuj helpus la kreon de tiu komune-homa kulturo, ĉerponta sian vivsukon el Esperantismo kaj radionta super niaj gentaj kulturoj (samloke).

Kiun estontecon havu UEA kaj kiuj estas la ĉefaj bariloj al tiu estonteco? Asocio subtenata de siaj membroj, sed kun pli vasta gamo de servoj, aŭ pli efikaj servoj? Asocio dediĉita al la disvastigo (kaj lernigo?) de Esperanto, kies servoj ekzistu ĉefe por enspezigi la rimedojn bezonatajn por tiu disvastigo? Asocio kun detala kaj specifa politiko rilate lingvan diskriminacion, lingvan egalecon, lingvajn rajtojn ks., kiu trovu sian rolon inter la aliaj diversaj neregistaraj organizaĵoj? Tegmenta asocio kun filioj en la diversaj landoj (kontraste al la nunaj sendependaj landaj asocioj)? Asocio, kiu vivas ĉefe per kampanjoj ligitaj al specifaj celoj, por kiuj oni kolektas monon, kaj surbaze de kiuj oni antaŭenigas kaj disvastigas Esperanton? Asocio dediĉita al la Esperanto kulturo, kun servoj kaj agadoj, kiuj ĉefe emfazas la plifortigon de la Esperanto-kulturo kaj Esperanto-movado, kaj donas proporcie malpli da atento al disvastigo kaj lernigo? Inter tiuj diversaj eblecoj (kaj kombinoj de eblecoj), kiun estontan rolon havas la REVUO kaj la kongresoj?

Ĉu la REVUO restu esence tia, kia ĝi estas, aŭ fariĝu unu elemento en la komunika strategio de UEA, kiu inkluzivas rete bazitajn iniciatojn ks.? Ĉu la kongresoj restu esence tiaj, kiaj ili estas, aŭ fariĝu festivaloj de la Esperanto-socio kaj Esperanto-kulturo? (v. *Jubileanto*, kongresa kuriero de la 93a UK, n-ro 5). Sendube Tonkin bone konas ĉiajn deficitajn kaj problemajn, ĉar li estas granda spertulo, klerulo kaj saĝulo. Analizante la supre starigitajn demandojn, ni sentas la bezonon aldoni kelkajn punktojn en la konsiderado pri la estonteco de Esperanto, kun kiu UEA estas intime ligita, se ĝi volas daŭre plenumi la supre menciitajn funkciojn.

1) La Esperanto-movado devas emancipiĝi de sia *priesperanta* koncentriĝo kaj transiri pli ofte al la *peresperanta*-dimensio. Lige kun tiu postulo la Esperanto-movado devos pli efike utiligi la sperton de la fakaj profesiuloj, kaj tiuj fakuloj estu alvokataj pli efike transdoni ilian profesion kaj fakan sperton al la Esperanto-movado, sur ĉiuj kampoj kaj laŭ ĉiuj manieroj. Diletanteco kaj hobiismo estu evitataj. Konklude: Nur se Esperanto estos grava kaj respektata lingvo kun prestiĝo, ĝin ankaŭ lernos pli da homoj. Inter esperantistoj signifan rolon povus ludi ĵurnalistoj, sociologoj, historiistoj, tradukistoj, literaturistoj, instruistoj-pedagogoj.

2) En la strategio de la Esperanto-movado kaj de UEA devus esti elektitaj novaj prioritatoj: a) rilate geografion, b) rilate partnerojn, c) rilate temojn. Ne havante la forton reprezentiĝi en ĉiuj landoj kaj ĉiuj sferoj, kie ĝi havas membrojn kaj delegitojn, oni devus unue fari detalan analizon de riskoj kaj ŝancoj por la unuopaj landoj kaj sferoj.

3) Lige kun siaj prioritataj landoj, sferoj kaj temoj, la Esperanto-movado kaj UEA devos impulsigi pli da pragmataj projektoj en la internacia laboro, serĉi pli aktive sponsorojn (de ekstere), kiuj pretas apogi interesajn projektojn lanĉitajn de esperantistoj.

4) Estus dezirinde, se la interna heterogeneco de la Esperanto-movado reduktiĝus, por ke ĝi povu elpaŝi pli unuece. Sub la titolo „Esperanto” agadas la plej

diversaj klubetoj, subgrupoj, organizaĵetoj, asocietoj, kelkfoje iom frenezaj individuoj kaj vere rigidaj ideologiaj tendencoj, kiuj ofte evitas aŭ malŝatas sin reciproke. Iuj eĉ kontraŭstaras aliajn. Al nia movado „aliĝas – flanke de elementoj progresemaj kaj idealistaj – homoj kun utopia mentaleco, stranguloj, maniuloj, kaj aliaflanke malkontentuloj, ambiciuloj aŭ simple amatoroj; ĉiuj malhelpas pozitivan agadon, ĉu ĉar ili ellaboras tute nerealigeblajn projektojn, ĉu ĉar ili uzas la movadon (···) por pure personaj celoj” (Hector Hodler, *Pripensoj*, en: *Esperanto* n-ro 159/1913). Tio estas granda obstaklo por povi elpaŝi pli unuece. Do, pli da kohereco devos esti atingita, sektemo estu ĉiel evitita, pli da pragmateco devos esti aplikata. Dubindajn agadojn en la nomo de Esperanto oni devus povi kontraŭi pli efike (ekzemple fuŝan publikan propagandon).

La Esperanto-movado estas elstara ekzemplo de movado, en kiu plej diversspecaj stranguloj, fanatikuloj kaj ideologiaj ekstremuloj de dekstre ĝis maldekstre dominas la agadon kaj kie multaj diletantoj kaj fuŝuloj povas influi la aferojn, tre ofte surbaze de improvizado kaj malkompetenteco. En la Esperanto-movado preskaŭ ne ekzistas objektiveco, grandparto estas dominata de mistiko, memlaŭdo, blufado, legendo, singlorado, supertakso, fanfaronado, personkulto. Ĉiu disvastigas sian propran propagandon, sian propran veron, sian propran subjektivan version, ĉu UEA, ĉu la Civito, ĉu SAT, ĉu aliaj – fakte ĉi tiuj Esperantoorganizaĵoj havas nenion komunan krom la lingvo kiun ili uzas kaj eble krom la mempretendo pri pravenco. Fruktonojn diskutojn en la Esperanto-movado ne okazas, ĉar neniu interesiĝas pri la opinio de la alia, kaj ĉiu fiksiĝas rigide sur sia propra opinio, egale ĉu tiu opinio havas sencon aŭ ne. Sekve diskutojn en la Esperanto-movado pri kiel plibonigi la aktualan situacion, fariĝas praktike pli kaj pli malfacilaj. Sciencaj agadoj ekzistas nur malmultaj, plej ofte ligitaj al lingv(istik)aj demandoj, la resto baziĝas sur propagando sen ajna scienca bazo. Al substancia kritiko neniu reagas, eĉ male, la unuopuloj sentas sin ofenditaj, se ili sentas sin koncernataj de tiu kritiko, la resto konsistas el indiferenteco kaj senrespondeco, Kiel pruvas amaso da ekzemploj. En la Esperanto-movado la racia individuo povas ekzisti nur, se li/ŝi ignoras ĉian propagandon, ĉiajn malraciajn sintenojn, reagojn, komentojn kaj kritikojn, kiuj estas abundaj, eĉ kutimaj. Blufado, mistiko, troigo, ŝajno, revo, klaĉoj, eble ankaŭ envio kaj ĵaluzo (pro nenio) karakterizas la etoson en la Esperanto-movado, ne la realeco. En ĉi tiu movado ofte la racia individuo estas detruita de la neraciuloj, de la spekulantoj kaj flatantoj-hipokrituloj, dum tiuj lastaj triumfas. En la Esperanto-movado ofte dominas homoj, kiuj fiaskis en la civila vivo, kie ili havis personajn karierajn ambiciojn, kaj kiuj serĉas rekompencojn en la Esperanto-movado, kie tiaj personoj havas la okazon ludi rolon, eĉ kun la aplaŭdo de iuj iliaj admirantoj de la sama speco. La Esperanto-movado ankaŭ tute ne interesiĝas pri sia propra historio aŭ ekzemple pri identeco-problemoj de individuaj movadanoj, ĝi ne interesiĝas pri sociologio, nek pri lingvofilozofio, nek pri kulturanthropologio, nek pri io ajn ligita kun tiuj disciplinoj. Fakte krom pri la „fina venko, iom pri lingvopolitiko kaj t.n. lingvaj rajtoj (kiujn ĝis nun neniu kapablis difini), la Esperanto-movado interesiĝas pri nenio alia. Progresantojn, kiuj volas plu lerni Esperanton, oni lasas stari sub la pluvo, ĝis tiuj forlasas nin frustritaj. Ĉefe gravas, se oni pagas la kotizon kaj partoprenas la ĝeneralan jarkunvenon, dum la kunsido oni prefere silentu kaj aplaŭdu la (memelektitajn) estrojn kaj (pseŭdo)gravulojn, kiuj diskutas banalajn aferojn. Oni promesas ion ajn, 1001

aferojn, sen plenumi la promesojn, ĉar oni timas respondecon. Riproĉojn kaj kritikon oni rifuzas. El tiuj vidpunktoj tiu movado estas sufiĉe subevoluinta. Neniu kuraĝas kaj pretas fari objektivajn analizojn kaj konsideri konkludojn, ĉar mankas kapablo kaj kuraĝo. Monde kompareblaj atingiĝoj (sukcesoj kaj produktoj) ekzistas en Esperanto nur malmultaj, kreitaj de iuj eksterordinaraj talentuloj.

5) Universalaj Kongresoj: a) provi allogi/inviti pli grandan parton de la esenca Esperanto-intelektularo, b) pli celtrafe kaj konkrete plani la programon (pli da kvalitaj, malpli da kvantaj programeroj), pli efika tempoplanado, limigo de paroltempoj kaj koncentriĝo pri la esenco, c) plibonigi la engaĝigon de partoprenantoj kaj prelegantoj kaj eviti tro da paralele okazantaj kunvenoj, minimumigi la hazardecon kaj konsumpasivecon, ĉ) ĝenerale altigi la lingvonivelon kaj la „Esperanto-klerecon” de la partoprenantoj kaj starigi pli severajn kompetenteco-kriteriojn por la gvidantoj de programoj, eviti tedajn kaj diletante gvidatajn kunvenojn, d) ĉesigi la diserigon kaj perdiĝon de la UK-publiko, pli celtrafe integri ĝin en la unuopajn programerojn, e) pli forte integriĝi en la „ekstera mondo” pere de pli sentebla kunlaboro kun la „ekstera publiko, f) revizii la kongresajn kotizojn (i.a. aboli diskiminaciajn landajn kaj aliĝktizokategoriojn kaj enkonduki rabaton por oficialaj prelegantoj kaj kontribuantoj, pli altajn subvencio-kotizojn por pagipovuloj kaj „pasivaj vizitantoj“), g) reekzameni la „turisman koncepton, ĝ) eventuale modifi la datojn (ekzemple lunde – malfermo ĝis vendrede - fermo, sen vakuaj semajnfinoj – fakultativa turisma programo, modula program- koncepto, okazigo ekster somero ktp.). Inter tute pozitivaj pritaksoj de la roterdama UK atingis nin ekzemple ĉi tiu mesaĝo de partopreninto, kiu povas esti konsiderata kiel reprezenta opinio: „La vasta programo tre kontentigis min, sed mi nervozigis pro la malbona komprenebleco de pluraj parolantoj. Ili fuŝis paroli tra la mikrofono aŭ parolis tro rapide aŭ estis malbona akustiko. Precipe la plej lastan observon oni ĉiujare povas ricevi. Ni esperas, ke venos la tempoj, kiam ĉi tiu problemo pliboniĝos aŭ malaperos. La sama informanto, cetere tre objektiva prijuĝanto, estis malkontenta pri la nivelo de la arta, nacia kaj internacia vesperoj (tion konfirmis aliaj sendependaj informantoj), dum la malfermon kaj la fermon li trovis distinge strukturitaj. Estas ja klare, ke tia pritakso ne helpas al niaj kulturaj programoj povi konkuri kun aliaj. Ĉi tie ni aldonu jenan komenton: en 1910 okaze de la malfermo de la Unua Ruslanda Kongreso L. L. Zamenhof diris: „Niaj kongresoj, ne sole la universalaj, sed ankaŭ la naciaj, havas antaŭ ĉio signifon instruan kaj edukan“. Ne malpli grava estas do „la *eduka* signifo de la esperantistaj kongresoj”. Kaj: „kiam la balbutanto venas al la kongreso, kie li havas la eblon aŭdi bonajn kaj spertajn esperantistajn oratorojn, kiam li per siaj propraj oreloj kaj okuloj konvinkiĝas, kiel bele kaj flue oni povas paroli en Esperanto, li entuziasmiĝas, li vidas, ke li laboras por io vivoplena, li revenas hejmen kun nova kuraĝo kaj energio. Sed L. L. Zamenhof ankaŭ diris: „Internacia esperantista kongreso estas antaŭ ĉio festo de la Esperantismo kaj propaganda manifestado. Sed krom tio ĝi havas (aŭ almenaŭ devus havi) ankoraŭ alian tre gravan rolon: diskuti kaj decidi pri ĉiuj demandoj, kiuj koncernas nian tutan aferon kaj ne povas esti solvataj de apartaj personoj, societoj aŭ institucioj esperantistaj“. Sekvante ĉi vortojn ni atendas malpli da rutino favore al novaj ideoj, formoj kaj konceptoj. Ideo por nova koncepto de UK povus esti, ke okazu ĝenerala Esperanto-mondkongreso, en kiu diversaj organizaĵoj

ludu la kunorganizan rolon. (Zamenhof parolis pri tia kongreso en 1910.) Tio povus faciligi la partoprenon en la kongreso de (ne malmultaj) personoj, kiuj kutime ne partoprenas la UK, kaj kiuj povus ĉefe kvalite kontribui.

6) Komplete renovigi la informan agadon de UEA. La informado devos efektiviĝi pli rapide, pli efike, pli substance, sen teda propagando. Tre utila en la retujo uea.org estas la Katalogo kaj la Arkivo.

7) Remeditadi pri la ideologio, filozofio kaj solvo de bazaj kontraŭdiroj – komence de la 21a jarcento, de la 2a jarcento de UEA, devos esti solvitaj du kernaj demandoj de la esperantismo: a) kiel solvi la kontraŭdiron inter la lukto je homaj rajtoj, kiu estas esence politika tasko, kaj la politika neŭtraleco de UEA? b) kiel solvi la paradigman konflikton inter perdo de la kredo je la „fina venko” de Esperanto en vastaj (intelektulaj) rondoj de la Esperanto-movado kaj la atribuo de (nova, estonta) rolo de la Esperanto-movado? c) kiel solvi la konflikton inter la aserto, kiu regas eĉ inter sciencaj esperantistoj, ke Esperanto estas la *vera* Ilo aŭ la Ilo *de facto*, kvankam nur relative malmultaj homoj parolas tiun lingvon? d) kiajn vidpunktojn difini, kadre de lingva politiko, vidalvide de hegonomiaj lingvoj (kiel la angla), por ke ili estu pragmataj, kredindaj kaj utilaj al la laboro de la Esperanto-movado? Kaj kiujn rimedojn necesas apliki, por ke la internacilingva ideo restu kiel tagorda punkto ĉe la internaciaj organizaĵoj? e) Ĉu daŭre kalkuli precipe je la oficialaj registaraj kaj la kun ili kunlaborantaj neregistaraj organizaĵoj. Tre grava devus esti ĉi tie por ni la averto de Hodler, kiu diris: „Oni forlasu la blufon de la nomoj de eminentuloj, sciencaj aŭ registaraj, kiuj okaze ellasis favorajn vortojn pri Esperanto, sed praktike tre malmulte interesiĝas pri ĝi (*Nova tempo – novaj metodoj*, en: *Esperanto* n-ro 49/1909) Ĉu pli ofte serĉi kunlaboradon kaj sponsoradon ĉe la „kapitalismaj” internaciaj firmaoj? f) Kiel oni difinu kaj komprenu la neŭtralecon de UEA, de la Esperanto-movado? Ĉi tiuj kaj eble ankoraŭ aliaj ĉefpunktoj estas intime ligitaj kun la neceso serĉi kaj trovi novajn ideojn por la strategio de la Esperanto-propagando kaj -informado. Dum la roterdama UK okazis kelkaj rimarkindaj iniciatoj: fondo de nova Literatura Akademio, starigo de Sociologia Esperanto-Grupo, jarkunveno de la revivigata Tutmonda Esperantista Ĵurnalista Asocio, prezentado de iuj literaturistoj kaj artistoj. Ni bonvenigas tiujn novajn iniciatojn, kiuj al intelektaj agadoj espereble donos novan puŝon, anstataŭante tiujn organizaĵojn, kies intelekta potencialo ŝajnas esti elĉerpita. Sed ni timas, ke sen vasta apogo kaj sen monaj rimedoj ankaŭ tiuj agadoj restos diletante gvidataj, ankaŭ ili ne prosperos kaj restos efemeraj epizodoj de unuopaj entuziasmoj. Tial ĉi tiujn novajn (kaj malnovajn) agadojn necesas konsideri kaj subteni, morale kaj finance. Ĉio banala, stulteta, diletanta, naiva, malaltkvalita, embarasa ktp. ne plu estu subtenata de ni. Amatorecon ni toleru, sed nur sur alta nivelo. Sed ĉiuj novaj agadoj prosperos nur tiam, se ili estas liberaj de la menciitaj negativaj tendencoj.

En la UK ni vidis multajn gejunulojn. Kion fari kun ili? Necesas ilin saĝe integri en la Esperanto-movadon, por ke ili havu en ĝi perspektivon kaj vidu sencon okupiĝi pri Esperanto. Pri TEJO kiel taŭga organizaĵo por tiu celo ni pli kaj pli dubas. Ŝajnas, ke ĝi elĉerpis sian potencialon. La maljuna generacion de esperantistoj ni estimas kiel pacaj batalantoj kaj esperas, ke ili subtenos novajn ideojn kaj komprenos, ke ni vivas en aliaj tempoj. Sed ni ne ŝatos, se inter tiuj malnovaj aktivuloj troviĝos homoj, kiuj kondutos laŭ la moto „post mi la diluvo“.

Necesas do pli profunde pripensi la aferojn. Nia celo estos savi kaj vigligi la Esperanto-movadon, kaj en tiu malfacila tasko necesos pragmate, realisme kaj kohere analizi, plani, agadi. Eble kun drastaj decidoj. Sed ni ne kapablas tion fari en soleco. Ni bezonas vastan apogon. Koncerne la programon de la UKoj eblas jam nun komenci per modifoj de la programa koncepto, por ekvilibrigi ĝin kaj altigi ĝian kvaliton.

La supraj postuloj signifas provokon kaj defion. En tio Esperanto kaj UEA ne devas esti reinventataj. Ĉar Esperanto nuntempe estas eble eksmoda lingvo sen prestiĝo, necesas klopodi por ke ĝi iĝu pli moda kaj pli prestiĝa, dum UEA devos adapti sian strategion al la bezonoj de la nova mondo, kiel oni klare komprenas en UEA. Ĉar la nuntempa mondo estas multoble pli kompleksa ol antaŭ 100 jaroj, necesas elpensi, en kiu niĉo Esperanto taŭgas, ĉar nuntempe nur niĉeco de Esperanto eblas. Kelkaj kondiĉoj, kiuj antaŭ 100 jaroj faris Esperanton aktuala, certe forfalis. Sed tio tute ne signifas, ke ankaŭ UEA devos malaperi. La konkurenco por la Esperanto-movado precipe flanke de plej diversaj neregistaraj organizaĵoj, kiuj laŭte agadas favore al homaj rajtoj, estas granda. Sed ŝajnas, ke ankaŭ ili ofte nur faras bruon kaj disvastigas varman aeron por egoisme atentigi pri si mem. Certagrada agresemo necesas por esti aŭdata. Ĉar esperantistoj kutime ne estas agresemaj, ili apenaŭ estas aŭdataj. Ekstremismoj, kiel politikaj manipuloj, religia fanatikeco kaj ekonomia ekspluatado ktp. ne povas esti la idealoj de „neŭtralaj” esperantistoj. La Esperanto-movado estas humanisma movado, kiu agas surbaze kaj vizie de la homaj (kaj lingvaj) rajtoj. Tia ĝi restu. Ankaŭ UEA devos resti.

Tamen. Ni apartenas al tiu generacio de esperantistoj, kies pacienco elĉerpiĝis: rilate la „libertempo-konceptan” Esperanto-movadon, rilate la diletantecon kaj naivan sindefendadon en vastaj Esperanto-medioj, rilate la pseŭdoutilecon, diferentecon kaj fuŝagadon de Esperanto-aktivuloj, rilate la banalecon de multaj Esperanto-produktoj kaj -servoj, rilate la stagnadon kaj vanecon de la diskutoj pri Esperanto, rilate la kondamnon al sensignifeco de Esperanto en la mondo, rilate la senperspektivecon de la afero. De tiuj, kiuj laŭte kaj publike anoncas renovigon, refreŝigon, estontecon, oni atendas progresojn kaj konkretajn rezultojn. Ni *plu* laboru kaj esperu!

(Aperis en *Spegulo*, 2/2009)

Kritiko – ne dankon ! ?

Kial radikala kritiko de la Esperanto-movado necesas

Kutime, kritiko estas ligita kun la pedanta mallaŭdo pro iuj bagateloj – en la profesia ĉiutago kaze de dungito, kiu malfruis je kvin minutoj aŭ faris eraron en letero aŭ fuŝtjapis la retadreson ktp., en la armeo se la kravato ne estas korekte bindita, se la hararo tro longas malantaŭ la oreloj aŭ se la saluto al oficiro ne sekvis ĝustatempe. Do, kritiko ĝenerale implicas ion esence negativan. Kritikitoj pro tio povas fariĝi tre frustritaj, perdi sian laboremon kaj lojalecon kaj eĉ ekmalŝati aliajn homojn. En la moderna labormerkata psikologio oni parolas pri mobingo. Mobingaj formoj estas plurfacetaj, kaj ili funkcias praktike ĉie, cetere ankaŭ en la privata vivo.

La lastatempa sperto kun kritikado de pridubindaj kaj eble plibonigindaj ekzistaĵoj sur diversaj niveloj kaj terenoj en la Esperanto-movado (fare de la subskribanto) instigis min verki ĉi tiun artikolon pri la temo ‚kritiko‘. Por ricevi ilian opinion pri la temo, ilian klarigon de la fenomeno, mi konsultis plurajn elstarajn esperantistojn de diversaj etnaj kulturoj. Jen kelkaj konkludoj.

Kritikado en volontula kaj amatora medioj

En la Esperanto-movado, organizo profunde volontula, honorofica, amatoreca kaj hobiisma-klubeca (kio en si mem estas nenio malbona), do malprofesia, heterogena, nekohera, inerta, tendence anarkieca, propagandisma, ĉiu estas bonvena kunlabori, eĉ gvidi, verki kaj prelegi, sendepende de la faka kompetenteco, se la prezo estas senpaga. Konkurenco preskaŭ ne ekzistas (kaj ofte nedeziratas)⁶⁸, kontrolo de la laborkvalito same forestas (kun kelkaj malmultaj esceptoj en profesieca ĉirkaŭaĵo), la rezervujo de ideoj kaj aplikoj, ĉu taŭgaj aŭ ne, estas neniam plena. Ĉiu kontribuas laŭ siaj ebloj kaj manieroj, respondecante pri sia propra produkto, fervore propagandata, sendepende de ĝia kvalito kaj sencohavo. Oni alte tenas la idealon de kunlaborado, kiu en la praktikado estas tre malfacile efektivigebla, ĉar multaj izolite agantaj aktivuloj veturas propran trajneton. Kritiko ‚ad rem‘ estas kutime perceptata – kaj rifuzata – kiel kritiko ‚ad hominem‘; el kritiko povas naskiĝi akraj konfliktoj kaj kvereloj ĝis reciproka bojkotado de la agado kaj agantoj. En la Esperanto-movado kritiko kaj kvereloj havas longan tradicion, ekde la zamenhofa tempo.⁶⁹ Kiom da vana energio estis perdita en tiuj konfliktoj! Estas eĉ malfacile diri, ĉu tiuj konfliktoj solvis ion ajn en la movado. Pruvi aŭ malpruvi tion estas nefacile. En multaj kazoj eblas dubi, do ili estis vanaj.⁷⁰

⁶⁸ Aliflanke, necesas ankaŭ konstati, ke en la Esperanto-movado estas sufiĉe malfacile surmerkatigi novajn senkonkurencajn produktojn.

⁶⁹ Ni pensu ekzemple pri la lingvaj reformdiskutoj en 1891-94 kaj denove ekde 1907 (Ido-skismo) aŭ pri la disputoj pri la homaranismo de L.L. Zamenhof. Aliaj elstaraj ekzemploj estas la skismo inter la neŭtrala kaj SAT-movadoj en la 20aj jaroj, aŭ la UEA-IEL-krizo inter 1936 kaj 1947, aŭ la historio kun Ivo Lapenna kun kulmino en 1974, ktp. Pri senĉesaj kvereloj en Landaj Asocioj ni tute ne parolu.

⁷⁰ Eble tamen ne la fondo de UEA en 1908.

Elstara planlingvisto svisa komparis Esperanton kun religio, la Esperanto-movadon kun ordeno. Itala samideano, kiu korespondis kun mi ĉi-teme, konfirme atribuis al la Esperanto-movado la trajtojn religi-surogata, heroema, martireca, simbolmuela, idolana. Kiel ajn oni ece karakterizu ĝin, la Esperanto-movado estas relative malgranda movado (tio estas grava paradokso konsidere ĝiajn universalismajn ambiciojn). La esperantistoj investis amason da tempo kaj energio en lernado kaj praktikado de la lingvo. Ofte ili multe laboras por Esperanto, sen kompenso. Subkonscie ili do atendas, ke iliaj kolegoj rekonu tiujn faktojn. Ni ofte fuŝas, sed ne volas aperi antaŭ la aliaj esperantistoj kiel fuŝuloj. Sekve ni estas sentemaj pri kritikado. Ĉi tiujn frazojn skribis al mi konata usona esperantisto kun longa movada sperto, kiun mi petis opinii pri la temo kritiko.

Lerni el eraroj kaj fuŝoj

Fuŝoj, misoj kaj eraroj, kiel normalaj akompanantoj de la homa laborado, en si mem ne estus tioma tragedio, se poste oni volus kaj povus eviti ilin. Multe pli grava kaj pensiga estas la fakto, ke kritiko kaj memkritiko en la Esperanto-movado tro ofte ne trafas al fekunda tero, ke (severajn) kritikantojn oni konsideras stranguloj, herezuloj kaj nest-malpurigantoj, fojfoje aĉuloj, mensoguloj kaj mensmalsanuloj. Mi mem spertis tion. Memlaŭdado, singlorigo kaj sinpravigo anstataŭ kritiko kaj memkritiko certe kontribuas al la kialoj, kial la Esperanto-movado vere ne progresas, ne povas progresi. Ĉi tiu situacio, kiu ja ne estas tipa ekskluzive por la Esperanto-movado, estus analizinda far la sociologio, psikologio kaj patologio-psikiatrio.⁷¹ Nature ni ne konkludu, ke en la Esperanto-movado ekzistas nur fuŝuloj kaj mallertuloj, ĉar ni bone scias, ke ekzistas pruveble elstaraj agad-rezultoj de amatoroj kaj volontuloj (kiuj ofte estas samtempe seriozaj profesiuloj-fakuloj-kompetentuloj). Sed ne tio estas nia temo.

Kio estu kritikata - aŭ kritikebla - en la Esperanto-movado? Principe ĉio, kio estas kritikinda kaj kritikenda, kiel konfirmis la konsultitoj. Kaj kiu rajtas kritiki? Precipe ĉiu, kiu deziras esprimi kritikon kaj kiu estas kompetenta aŭ sentas sin tia. La celo de ĉiu kritiko ja estas aŭ devus esti, ke ĝi estu aŭdata kaj ke ĝi havu efikon. Rajtas kritiki tiu kiu povas klare difini la kriteriojn kaj celojn, kaj tiu kiu povas klare analizi, ke la celojn oni ial ne atingis/as, sed ja povus atingi per aliaj rimedoj, kiel instruis min esperantisto el Nederlando.

Kion do kritiki ?

Laŭ klasika difino ‚kritiko‘ signifas en ĝenerala senco ekzamenan prijuĝadon laŭ pravigeblaj normoj por pritaksi la valoron aŭ malvaloron de iu aĵo aŭ afero, aŭ persono. Ekzistas diversaj kvalitaj specoj de kritiko, ĉefe jenaj:
- pozitiva kritiko, t.e. laŭdo, agnosko, admiro

⁷¹ Ĉi-rilate iom da laboro estas farata ekzemple de Esperanto en perspektivo (1974), Forster (1982), Leyk (1984), Raŝić (1994), Carlevaro (1994-96), k.a.

- negativa kritiko, t.e. mallaŭdo, rifuzo, kondamno
- konstrua kritiko, t.e. kritiko, kiu celas plibonigi iun (mis)staton
- detrua kritiko, t.e. kritiko, kiu celas neniigi aĵon, aferon aŭ personon
- memkritiko, t.e. prijuĝo de la propra sinteno, agado, laboro

Unu el la konsultitoj respondis, ke ja eblus kritiki seke-serioze (severe), sed ankaŭ ironie-pike, depende de la kritikindaĵo. Ne ekzistus unusola taŭga kritikmetodo. Plej gravus, ke la kritiko baziĝu sur faktoj kaj ke ĝi estu klare esprimita, mi aldonus: neŭtrale, objektive.

Konkretaj kazoj

Por ne resti abstrakta, kritiki en la Esperanto-movado per tiu aŭ alia metodo oni povas plej diversajn aferojn: ekzemple la ĝeneralan strategion de la Esperanto-movado⁷² aŭ la neobjektivan prezenton de Esperanto en fanfara stilo kaj fantazia maniero, aŭ la malaltan nivelon de iuj Esperanto-aranĝoj aŭ parton de la programo de Universala Kongreso, la malbonan Esperanto-lingvouzadon de iuj samideanoj propagandantaj nian lingvon,⁷³ aŭ la mankon de interesaj kaj altnivelaj artikoloj en movadaj ĉefperiodaĵoj. Eblas pridisputi unuopajn doktrinojn kaj agadojn kiel ekzemple la tiel nomatan raŭmismon aŭ la Esperantan Civiton kun ties konsuloj kaj senatanoj⁷⁴ same kiel aliajn blufaĵojn, kiuj abundas en la Esperanto-movado, kiel la akademias titoloj de AIS, aŭ la Manifeston de Prago kun ties pseŭdosciencaj trajtoj kaj integraj kontraŭdiroj.⁷⁵ Sur alia nivelo de kritikado eblas pridubi la ĝeneralan kvaliton de la Esperanta Vikipedio, kies reputacio riskos esti malbona, se ĝi restos eterna konstruejo kun gigantega nombro da nefidindaj kaj nekompletaj informoj.⁷⁶ Negative recenzi oni povas iujn fuŝajn vortarojn aŭ lernolibrojn didaktike ne sufiĉe elpruvitajn. Aliaj kritikoj povas koncerni la teknikan nefunkciadon de iuj asociaj organoj aŭ malbone organizitan ekskurson, jarkunvenon, prelegon, ktp.; kutime ĉi tiu kritiko estas ligita kun la mallaŭdo de unuopaj personoj, kiuj malbone funkcias malgraŭ siaj respondecoj, ktp. Do la spektro por kritikado estas varia kaj vasta. Nature, ofte la kritiko riskas fariĝi subjektiva, ĉar ĉiam ekzistas ankaŭ la alia flanko de la medalo, la alia percepto de la aferoj. Kion iu trovas malbona, alia trovas bona, kaj inverse.

En la Esperanto-movado funkcias ankaŭ pli subtilaj formoj de kritikado, esprimata ekzemple en prilibrigaj recenzoj, en kiuj kritiko povas terure ofendi la koncernatojn, kiuj kredas, ke la kritiko estas maljusta. Multaj kazoj estas konataj, kelkaj el niaj intelektaj komunumanoj perfekte regas tiun arton de pika recenzado, polemikado kaj pamfletado.⁷⁷

⁷² La kritiko pri UEA flanke de la Esperanta Civito jam estas bone konata.

⁷³ Ekzemple la forgeson de akuzativo.

⁷⁴ Reprezente vd. la kritikon de Detlev Blanke: *Ĉu manifesti kaj civiti?* (2000).

⁷⁵ vd. ekzemple la kritikon de Christopher Culver (2005).

⁷⁶ vd. ekzemple la kritikon de Niko Kalivoda en *Ipernity* (2008).

⁷⁷ Unuavice mi pensas pri Hauptenthal, Silber kaj Camacho, kies ĉi-rilataj verkaĵoj apartenas al la plej legindaj de tiu ĝenro.

„Pozitivismo” en kritikado

Ĉiuj kolegoj kiujn mi demandis pri la punkto kiel kritiko estu esprimata, respondis, ke kritikon necesus esprimi per afablaj, ĝentilaj vortoj, ĉar plej ofte temas pri volontuloj, al kiu tiu kritiko eventuale estas direktata. Volontuloj mem principe ne meritas (negativan) kritikon, sed laŭdon kaj subtenon. Ĉar ni estas amatoroj, ni malmulte scias ekzemple pri publikaj rilatoj kaj similaj profesiaj terenoj. Sekve, se ni volas kritiki aliajn homojn kaj iliajn agadojn, ni devas tion fari tre delikate kaj tre kompreneme. Rektaj alfrontaj atakoj malofte utilas aŭ sukcesas, ĉar ili ne lasas sekan teron sur kiu la atakato povus daŭre staradi. Gravas, ke la kritikito povu „gardi sian vizaĝon”, kiel diras germanligvanoj. La personoj, kies agoj estas kritikataj, ricevu la impreson, ke la kritikanto opinias ilin kapablaj ĝustigi sian agadlinion kaj ne pensu, ke ili estas tute nekuraceblaj, kiel klarigis aktivulo el Hindio (Barato).

Fakte, kritiko en si mem ne estas io negativa, sed ofte oni perceptas ĝin tia. Sed kion fari, se nek la ĝentilaj vortoj, nek la pozitiva, nek konstrua aŭ seke-serioza kritiko, nek la ceteraj metodoj helpas kaj utilas? Kaj kion fari, se ne eblas demisiigi fuŝulon, kiel en la profesieca vivo, despli ĉar anstataŭanto apenaŭ troveblas, kiu laborus je la samaj (honoroficaj) kondiĉoj? Ĉi tiun dilemon ni ofte renkontas en la Esperanto-movado.

En medio kiel la esperantista ofte validas la principo, ke homoj ja deziras kritikon, sed nur tiun, kiu plaĉas al ili, kiel skribis iu samideano el Francio. Ke homoj ĝenerale tro malofte akceptas kritikon ad rem kiel kritikon ad hominem, estas ŝajne biologie klarigebla kaj pro tio nesurpriza, kiel avertis min ĉi-rilate informita kolego. Mi konas altmeritan esperantiston, kiu funkcias, fakte ĉiam funkciis, dum jardekoj, cetere kun la vasta admiro de la publiko, laŭ jena filozofio: Tiom longe ke mi laboras honorofice, mi faros kion mi volas laŭ mia bontrovo, neni povas dikti kaj ordoni al mi ion ajn, kaj mi ankaŭ ne estas kritikebla. Ĉi tia sinteno, kiu ebligas la plenan kaj nekontroleblan agliberon, fakte estas absurda kaj povas esti ankaŭ ruiniga, kiel montris praktikaj spertoj kun la filozofio de tiaj aktivuloj.

Diferencoj inter amatora kaj profesia medioj

Konsultita esperantisto kroata, kiu bone konas la diferencon inter komerca kaj honorofica laboro, esprimis pri tiu temo eble pravan vidpunkton kun komprenemo, ke, tamen, oni ja ne povas postuli absolutan profesiecon, se mankas mono en tiaj institucioj por pagi salajron. Ĝuste tia situacio kondukas al diletanteco, indiferenteco kaj senrespondeco, opinias mi.

Ĉu kritiko havas sencon?

La supraj konsideroj kondukas nin al la demando, ĉu kritiko entute havas sencon kaj efikon en la Esperanto-movado? Rilate al tiu demando ekzistas diverĝaj opinioj. Iuj pli skeptikaj kolegoj kredas, ke kritikado apenaŭ utilas, ĉar ĝi ripetiĝas preskaŭ senefike dum la historio de nia lingvokomunumo (mi mem inklinas al tiu „skolo”), pro tio ke

rolantoj venadas kaj iradas kaj do re(mis)inventas la radon (sed ne nur en tiaj kazoj). Iuj aliaj opinias, ke tamen jes kritiko povas efiki, en konkreta kazo, kondiĉe ke kritiko estas racia kaj aŭskultata, kaj kiam la koncernatoj devas estas pretaj akcepti kritikon. Denove aliaj havis miksitaĵajn spertojn kun kritiko. Ili diris, ke sencon ĝi ja havas, efikon nur probable. Polo skribis, ke lia sperto kun kritiko en la Esperanto-movado estas preskaŭ negativa, ĉar ĝis nun la kritikataj personoj kondukis laŭ la onidiro: hundoj bojas. En iu yahoo-grupo la prezidantino de iu landa asocio plendis, ke ŝi jam vane prezentis vidpunktojn senrezulte. Kritiko en la Esperanto-movado ja havas sencon, se ĝi estas zorga kaj konstrua kaj ne nur momenta kraĉo, avertis la konsultito nederlanda. Kiam hinda esperantisto antaŭ multaj jaroj volontulis ĉe la Centra Oficejo de UEA en Roterdamo, oni ja konsideris lian draŝan kritikon, kaj parte oni lernis el ĝi, kiel li skribis al mia ĉi-rilata demando.

Laŭ la opinio de sperta esperantisto en Nederlando, kritiko ne estas simpla esprimo de malplaĉo. Kritiko enhavu sintezon, analizon kaj konkludon. La celo de la kritiko ne estas/u malmunti/detru iun aŭ ion, sed plibonigi ion. Kaj li konfirmis, ke eĉ se unuavide kritiko aspektas negative, ĝi estas per si mem (cel)pozitiva, kvankam esceptoj abundas grandkvante.

Sendube: Ne mankas kritiko kaj ideoj. Sed mankas adaptiĝo al la nuna realo, kiel konkludis konsultita kolego el Finnlando. Kaj kun la nederlandano, kiu estas malnova admiranto de Karlo Markso, oni povas postuli laŭ la principo de la ‘senkompromisa kritiko de ĉio ekzistanta senkonsidere pri la objekto de la kritiko’, ke kritiko, eĉ se ĝi estas necese radikala, estonte estos espereble pli aŭdata en la Esperanto-movado. Alikaze tiu movado riskos fariĝi nekritikebla organizo; tio estus tre malbona afero, ĉar historie oni scias kio okazis kun tiaj movadoj.

Labori kaj agadi en Esperantujo do impresas kiel migrado sur la kresto de monto: Inter la tolerado kaj kritikado de misstatoj plej diversspecaj, kaj kun tio bedaŭrinde ankaŭ de ligitaj personoj. Tio estas tre malfacila spagato, ĉar necesas grandega porcio da komprenemo, pacienco, indulgo kaj fortegaj nervoj, se oni ne volas resti indiferenta.

Utilaj komentoj bonvenas, kaj (radikala) kritiko, eĉ kritiko de tiu ĉi kritiko, necesas.⁷⁸

Andreas Künzli

(Aperis en *Spegulo*, 1/2009)

⁷⁸ Mi mem kaj verŝajne ankaŭ la redakcio de *Spegulo* ricevis neniujn komentojn.